

Diablo aŭ sanktulo kiel prezidento

Ruslando inter demokratio kaj diktaturo

Kial Vladimir Putin estis reelektita malgraŭ malbona situacio en Ruslando
La ruslandanoj ja deziras ŝanĝojn, sed ne tiajn, kiajn la liberaluloj proponas

*Detala analizo de la aktuala situacio en Ruslando post la reelekto de Vladimir Putin
kiel prezidento de Ruslando en marto 2018*

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli



(Vladimir Putin, fotoj el Vikipedio)

La 18an de marto 2018 Vladimir Putin estis elektita la kvaran fojon kiel prezidento de Ruslando per rekorda plimulto de la voĉoj, kiujn la ruslandaj elektantoj donis al li, nome **56'411'688 voĉojn**, kio signifas **76,69 procentojn de la sumo de la voĉoj**. Jenaj kromaj 7 oficialaj kandidatoj rajtis partopreni kiel „konkurantoj“ en la prezidenta elekto kaj ricevis la sekvantajn voĉnombrojn: **Pavel Grudinin (KPRF): 11,77%**, **Vladimir Ĵirinovskij (LDPR): 5,65%**, **Ksenija Sobĉak („Civitana iniciato“): 1,68%**, **Grigorij Javlinskij („Jabloko“): 1,05%**, **Boris Titov („partio de la kresko“): 0,76%**, **Maksim Suraikin (KR-stalinistoj): 0,68%** kaj **Sergej Baburin („rusia popolunuiĝo“): 0,65%**.¹ En Moskvo voĉdonis por Putin 74%, en Sankt-Peterburgo 75% de elektantoj, kio estas surpriza rezulto, ĉar antaŭ 6 jaroj en tiuj pli liberalaj ĉefurboj voĉdonis konsiderinde malpli multaj homoj por li. La dato de la ĉi-jara prezidenta elekto, kiu estis pli rituala referendumo pri la politiko de Putin ol vere alternativa elekto de nova prezidento, koincidis kun la kvara datreveno de la jaro de la anekso de Krimeo, kies loĝantoj povis unuafoje baloti kiel rusiaj ŝtatanoj. Tion ili faris abunde: Sur Krimeo Putin ricevis 92 procentojn, en Ĉeĉenio kaj Dagestano po 91% de la voĉoj, kun rekorda partopreno.

Kiel kandidato oni rajtis registriĝi kaj esti akceptita por tiu elekto, se oni plenumis la kondiĉojn de la Centra Elekta Komisiono, al kiuj apartenis la prezentado de 300'000 validaj subskriboj. Ĉar jam antaŭ la elekto estis klare, kiu gajnos ĝin, la kunludintaj kandidatoj praktike havis neniun ŝancon kolekti pli da voĉoj ol Putin, ĉar la sistemo estas tiel aranĝita kaj konstruita, ke neniu alia kandidato ol Putin povas gajni la elekton. Tamen enkalkulante la riskojn, la aliaj kandidatoj partoprenis la senesperan cinikan ludon por fari la tedan rutinon kaj pli interesa, kaj mizere perdis ĝin. Iuj kritikaj observantoj riproĉis al tiuj kandidatoj, kiuj verŝajne estis antaŭselektitaj, ke ili lasis sin misuzi kiel marionetojn de la Kremlo por ŝajnigi demokration. Post la perdita ludo ili tamen devis senti sin profunde seniluziigitaj, humiligataj kaj ridindigataj de la ruza Putin-aparato, ĉar iujn personajn ambiciojn kaj esperojn ili verŝajne tamen havis sen konscii pri tia totala fiasko, kiu atendas ilin. Fakte, nur Grudinin, anstataŭanto

¹ Biografiojn de la kandidatoj vd. en la bibliografio.

de Gennadij Zjuganov kaj direktoro de sovĥozo, kiu eĉ ne estas membro de la partio, kiu starigis lin kiel kandidaton, povis signali, ke ankoraŭ ekzistas tavolo de iom pli ol dek procentoj en Ruslando, kiu preferas komunistojn, kiuj laŭdire okupiĝas pri sociaj demandoj.² La rusa ŝtata televido lanĉis malbelan misfamigan kampanjon kontraŭ Grudinin, kiu malgraŭ tio ne kapitulacis kaj daŭrigis la sendignan ludon por la potenco en la ŝtato ĝis la fino. Kvankam la malvenkintaj kandidatoj, kiuj estis altgrade ĉagrenitaj kaj frustritaj, kritikis la elekton kiel malpuran farson, ili ne hezitis en la posta tago akcepti inviton de Putin, kiu dum la kampanjo ankoraŭ rifuzis la diskuton en la debatoj kun ili, aperi en la Kremlo, kie la reelektita dommastro faris al ili prelegon pri la neceso de la politika unueco. Ion similan faras ankaŭ usonaj prezidentoj post la gajnita elekto kun la aliaj partianoj.

Se oni rigardas al la grupo de ceteraj kandidatoj, kiuj ial ne sukcesis partopreni en la ĉi-jara prezidenta elekto, oni legas krom Aleksej Navalnyj, la plej konata opoziciulo, ankaŭ la nomojn de Aleksandr Ĉuĥlebov (entreprenisto), Elvira Agurbaŝ-Kasenova (verdolino), Anton Bakov (monarkiisto), Roman Ĥudjakov (LDPR), Ekaterina Gordon („partio de la bonaj agoj“), Miĥail Kostov („partio por sociala protekto“), Natalja Lizicyna („ROT Front“), Stanislav Poliŝĉuk („partio por socialaj reformoj“), Irina Volyneĉ („popolpartio de Ruslando“), Vladimir Miĥailov („Jabloko“). Krom ili ekzistis ankoraŭ aliaj. Ĉiuj tiuj kandidatoj, kiuj reprezentas plej diversajn pseŭdo-partietojn, estis rifuzitaj de la Centra Elekta Komisiono, ĉar ial ili ne plenumis la kondiĉojn por esti akceptitaj. Sed neniu el ili estis tiel krude traktita kaj evitita de la rusaj aŭtoritatoj kiel *Aleksej Navalnyj*, kiu iusence fariĝis ŝtata malamiko n-ro 1.³

La 6an de januaro 2018 la Supera Tribunalo de Ruslando konfirmis la ekskludon de Aleksej Navalnyj de la partopreno en la prezidenta elekto okazonta la 18an de marto de ĉi tiu jaro fare de la Centra Elekta Komisiono de la Ruslanda Federacio, gvidata de Ella Pamfilova, kiun kritikistoj konsideras pura helporgano de la Kremlo. Ĝia argumento por tiu decido estis, ke Navalnyj estis jure kondamnita pro fraŭdo kaj trompo⁴ kaj tial ne rajtas partopreni en ŝtata baloto.⁵ Navalnyj tute ne pretis akcepti tiun verdikton kaj intencas plendi ĉe la Eŭropa Kortumo por Homaj Rajtoj. Sed antaŭ tio Navalnyj, kiu estas prezidanto de la „Partio de la progreso“, direktis sin al la Konstitucia Tribunalo de Ruslando, kvankam li pritaksis la ŝancon esti rehabilitita malgranda. Efektive, ĉi-lasto instanco rifuzis lian plendon kaj pravigis la decidon de la Centra Elekta Komisiono fine de decembro 2017. Kia grandega kruemilitiro de ĉiuj eblaj tribunaloj kontraŭ malgranda fiŝo, kiu naĝas kontraŭ la fluo de la putinismo kaj kiun Putin evidente timas kiel la diablo la benitan akvon!

En memorinda konferenco de la gazeto *Komsomolskaja pravda* okazinta la 11an de januaro 2018 kun Putin, unu el la ĵurnalistoj demandis la ĉeestantan prezidenton pri la kialo de la ekskludo de Navalnyj de la baloto kaj volis scii, kion li opinias pri ĉi tiu afero, pri kiu oni plendis en eksterlando, precipe en Usono kaj en kelkaj eŭropaj ĉefurboj. Anstataŭ doni kredindan respondon, Putin, kiu malagrade nervoziĝis, akre kritikis la enmiksiĝon de la eksterlando en la balotan procezon de Rusio, kion li konsideras absolute ne akceptebla, kaj konstante akuzis Usonon kiel ĉefan problemon. Plumpe nomante sian ĉefan politikan malamikon „la personaĵo, kiun vi menciis“, Putin avertis, ke en Rusio estas akcepteblaj nur kandidatoj, kiuj ne lezis la leĝon.⁶ Per tiuj sukaj rimarkoj ĉi tiu temo estis abrupte finita kaj oni transiris al alia ĵurnalista demando.

En diversaj elsendoj (‘talk-shows’) de la rusa ŝtata televido la oficialaj kandidatoj montris sin nekutime opoziciemaj kaj batalemaj kontraŭ la politiko de Putin kaj ne hezitis ankaŭ krude ataki unu la

² En la Malproksima Oriento (Primorskij kraj, Vladivostok) Putin kolektis nur 64-65%, dum en Jakutio Grudinin ricevis 27% de la voĉoj.

³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Alexei_Anatoljewitsch_Nawalny.

⁴ Temas pri diversaj juraj procesoj, kiuj estis gviditaj kontraŭ Navalnyj. En la kazo de Kirovles li estis kulpigita (julio 2013) pro laŭdira fraŭdo kaj kondamnita al kvinjara arestado en malliberejo.

⁵ Laŭ la koncerna leĝo, homo kondamnita de la tribunalo ne rajtas partopreni en elektoj dum la venontaj 15 jaroj, eĉ se la verdikto estis intertempe nuligita. Kritikistoj de tiu leĝo, kiun Putin mem proponis al la Dumao komence de 2013, rimarkigis, ke tiaj leĝoj estis speciale faritaj por kandidatoj kiel Navalnyj kaj Ĥodorkovskij. La Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj kritikis la kondamnon de Navalnyj kiel „arbitran“ kaj „politike motivitan“. En februaro 2016 la sama Kortumo juĝis, ke la decido de la distrikta tribunalo de Kirov estis kontraŭleĝa. Anstataŭ liberigi Navalnyj de la akuzo, ĝi nur interrompis la kazon, kio signifas, ke Navalnyj rajtis kandidatiĝi por publikaj oficoj, sed ke li tamen estas konsiderata kiel akuzita kaj ke la kazo devas esti denove traktata de la justico.

⁶ Nu, ankaŭ en eksterlando oni ne allasis kandidatojn al elektoj, kiuj estis kondamnitaj de la leĝo, ekzemple Silvio Berlusconi en Italio, por menci tiu faman ekzemplon de malagrabla politikisto.

aliajn. Sed la oficialaj unuhoraj debatoj de la kandidatoj okazis je la *8a horo matene*, cetera sen la ĉeesto de Putin, kiam la amaso de la aktivaj homoj ne plu estas hejme sed veturanta survoje al la laboro kaj en tiu horo do praktike ne rigardas televidon. La debatoj enhavis kelkajn tre kritikajn kaj polemikajn momentojn, kiuj povis esti embarasaj por la reĝimo kaj prefere ne estu montritaj je la 8a horo vespere, kiam la tuta nacio sidas antaŭ la televida ekrano, kiu ne estu konfrontata kun problemoj kaj kritiko de Putin-kontraŭuloj. En tiuj vervaj debatoj, en kiuj temis pri malagrablaj kaj tiklaj politikaj temoj kiel la malbona ekonomio, la rolo de la oligarkoj, la senefika burokratio, kiu praktike regas la landon, la mizera medicina provizado, la korupto kaj ekologio, sed en kiuj oni menciis ankaŭ la konfliktojn kaj militojn en Ukrainio kaj Sirio, ĉiuj kandidatoj postulis senprokrastajn ŝanĝojn en Ruslando. Inter la debatantoj elstaris precipe Ksenija Sobĉak, kiu klare tuŝis la multnombrajn tabuojn kaj, iom ironie, pledis por tio, ke la homoj voĉdonu *kontraŭ* ĉiuj ceteraj kandidatoj. En tiuj okazoj Sobĉak estis ofendita de Vladimir Ĵirinovskij, ĉefa politika klaŭno de Ruslando, per krudaj vortoj, kial ŝi ĵetis la akvon de sia glaso kontraŭ la vizaĝo de la bizara rusa ĉefskandalulo kaj tiel mem riskis diskreditiĝi kiel civilizita kaj sobra persono. Certe, la okcidentaj sankcioj kontraŭ Ruslando, kiuj estis aluditaj en tiaj debatoj, estis brula kaj vunda temo, sed oni gajnis ankaŭ la impreson, ke okcidentaj aŭ eŭropaj argumentoj, konsideroj kaj deziroj ne ricevis gravan atenton en tiu diskutokulturo, kiu estas sufiĉe emocia, nervoza kaj histeria kaj plejparte fokusita al la interna politiko de Ruslando, kvankam ĝi ne povas ekzisti sen obseda kritikado de la Okcidento, de Eŭropo kaj Usono, de kiuj la rusoj sentas sin mistraktataj kaj miskomprenataj. Dum la komunistoj blekis siajn malnovajn sloganojn kontraŭ la kapitalismo, parolis pri ideologiaj malamikoj kaj volas restarigi la socialismon kaj la sovetian reĝimon en Ruslando, Grigorij Javlinskij evidentiĝis kiel plej serioza, racia kaj realisma politikisto (el okcidenta liberala vidpunkto). Anstataŭ lukti unuope, tiuj partioj estus povintaj formi koalicion kontraŭ Putin, kion ili ja iusence faris nevole, sed tia solidareco ne havas tradicion en Ruslando. Ankoraŭ en la sama tago de la elekto Navalnyj rifuzis la proponon kunlabori kun Sobĉak.

Multnombraj lezoj de la reguloj

Dum la tago de la elekto mem, rusaj kaj eksterlandaj observantoj konstatis 2500-3000 lezojn de la balota proceduro. Por ilustrati kiel oni helpas al Putin gajni la elekton, Grigorij Mel'kon'janc, ĉefo de la organizaĵo „Golos”, rakontis jenajn kazojn kaj incidentojn: En iu firmao de la apudvolga urbo Uljanovsk oni diris al la dungitoj, ke estus dezirinde „por ni“ ricevi rezulton de 90-100% de voĉdonpartopreno. La homoj do prefere iru voĉdoni, „se ili amas la landon. Se ili ne amas ĝin, ili baldaŭ ne plu povos bani sin en la Nigra Maro, ĉar tie ekzistas NATO-militbazo“. Krome li klarigis, ke se la aŭtoritatoj konstatas, ke tro malmultaj homoj voĉdonas, ili devas elpensi ion kontraŭ tiu problemo. Do, okazis, ke la samaj homoj voĉdonis kelkfoje, unu homo voĉdonis por la tuta familio, kiu mem ne aperis en la voĉdonejo, alia ĉeestanto ĵetis tutan faskon da voĉdoniloj en la urnon. Tia praktiko estis observata en Dagestano. Aliaj rimedoj por allogi homojn estis vendado de malmultekostaj nutraĵoj en vendejoj en la proksimeco de la voĉdonejoj, aranĝado de popolfestoj, kiuj okazis en la tuta lando (kaj ja ne estas malpermesataj) aŭ ŝanĝo de la reguloj antaŭ la elekto. Laŭ *Novaja gazeta*, studentoj estis minacataj per la averto, ke ili povos havi problemon en sia kariero, se ili ne iros baloti. Al multaj voĉdonantoj oni rekomendis fotiĝi en la voĉdonejo por pruvi, ke ili vere partoprenis la baloton. Do, la elektantoj estis traktataj jen per promesoj kaj donacoj, jen per minacoj aŭ severaj admonoj, t.e. per sukerpano kaj vipo.. En januaro kaj februaro miloj da civitanoj ricevis retmesaĝon, en kiu ili estis informitaj, ke eblas voĉdoni ankaŭ en lokoj, kie oni ne loĝas. Ktp. Ĉar la Kremlo timis grandan pasivecon de la homoj, ĝi entreprenis ĉion eblan por atingi vastan popolan partoprenon en la elekto. Finfine, averaĝe nur 67 procentoj de la voĉdonrajtaj civitanoj partoprenis en tiu baloto, per kio la Kremlo maltrafis la celon de 70 procentoj. En iuj regionoj la kvoto de la partopreno estis eĉ konsiderinde pli malalta ol la averaĝo.⁷

Tiu tuta (dubinda) kampanjo signifis por Vladimir Putin, la 18an de marto 2018, klaran kaj grandiozan triumfon kaj kaŭzis totalan fiaskon al la opoziciaj kaj liberalismaj fortoj. Do, la okcidentaj sankcioj kaj la diskutoj kaj propagando en la alternativa interreto komplete maltrafis sian deziratan efikon ĉe la plimulto de la ruslanda popolo.

⁷ En la Moskva regiono la partopreno estis nur 63,6%, en Udmurtio 63,27%, Kaliningrad 62,3%, Krasnojarsk 60,34%, Komio 60,4%, Kostroma 60,51%, Omsk 60,49%, Novosibirsk 60,41%, Tomsk kaj Arhangelsk 59,2%, Novgorod 57,3%, en Bajkalia 57,99%, Tver 57,58%, en Karelio 57,2% kaj en Irkutsk 55,7%.

Tamen, la sendependa periodaĵo *Nezavisimaja gazeto* resume komentis, ke per tiu elekto Ruslando plene refalis en sovetajn tempojn, al kiuj apartenas la kutimo, ke la popolo de Ruslando ĉiam voĉdonas aŭ estas devigata voĉdoni por la aktuala reganto en la Kremlo, tutegale ĉu li nomiĝas Leonid Iliĉ Breĵnev, Miĥail Sergejeviĉ Gorbaĉov, Boris Nikolaeviĉ Jelcyn aŭ Vladimir Vladimiroviĉ Putin.

Eĉ se OSKE⁸ ne parolis pri falsado, ĝi tamen kritikis Rusion pro la evidenta apliko de „premo al la elektantoj“, „manko de konkurenco kaj vera elekteblo“ kaj „maljusta premo kontraŭ kritikantoj“. Per tio la organizaĵo klare pridubis – ankaŭ tio jam estas ritualo – la legitimecon, sencon kaj demokratian karakteron de tia baloto. Samtempe OSKE esprimis laŭdon pro la „efika teknika efektiveco de la baloto“. La plena skriba raporto pri tiu elekto aperos post du monatoj. Ella Pamfilova kontestis grandskalan lezojn de la reguloj, sed konfesis kelkajn mankojn kaj komunikis, ke la baloto estis nuligita en kvin disktrikoj pro malordeco de la proceduro, inter alie en Dagestano, kien OSKE cetere ne sendis observantojn, ĉar tro danĝera regiono por labori.

Por kompreni pri kio temas ĉe la problemoj de elektoj en Ruslando, Andreas Gross, svisa parlamentano kaj observanto de balotoj kaj elektoj kun longa sperto kaj serioza sinteno, klarigis, ke baloto aŭ elekto povas esti konsiderata kiel demokratia kaj akceptebla nur, se la elekta procezo, t.e. la tuta antaŭa kampanjo, plenumas difinitajn kondiĉojn kaj kriteriojn de Eŭropa Konsilio kaj OSKE. La elektoj en Ruslando de Putin neniam plenumis tiujn kondiĉojn kaj kriteriojn, ĉar en Ruslando ekzistas multaj obstakloj kaj faktoroj, kiuj malhelpas la liberan, plurisman kaj demokratian kultivadon de tiaj elektoj aŭ balotoj. Gross emfazis, ke elektoj ne konsistas nur el la formala akto de la voĉdonado en la balota tago mem, sed ilia demokrateco kaj legitimeco dependas de la tuta kampanja kulturo, kiu antaŭis ilin. Sed al la tuta politika kulturo de Ruslando esence mankas aŭtentika demokrateco, kiu konsistas el idea libereco kaj opinia plurismo. En la ŝtata sfero de Ruslando demokratio, libereco kaj plurismo ekzistas nur laŭŝajne, formale, kaj la ŝtato ne serioze, ne honeste flegas tiujn valorojn, sed male, subpremas, ignoras, mistraktas aliajn opiniojn, kiuj ja ekzistas en la popolo kaj aliaj politikaj partioj (kiel montris la televidaj debatoj de la kandidatoj aŭ la kritiko de Navalnyj kaj aliaj politikaj aktivuloj). Pro tio la elektoj en Ruslando ne povas esti konsiderataj kiel demokratiaj. Gross ne neas la principan eblecon, ke Putin povus esti elektita, eĉ se en Ruslando regus plena demokratio. Sed en tia kazo regus aliaj politikaj kondiĉoj kaj Putin verŝajne tute ne ekzistus kaj ne estus elektita por la kvara fojo. Aŭ ĉu tamen? Ankaŭ en aliaj landoj, eĉ en Germanio, ekzistas longdaŭraj ŝtatgvidantoj. Sed Putin mem konsideras Ruslandon demokratia ŝtato, kvankam eksterlando kontestas tion kaj kvankam Ruslando okupas nur la 135 rangon de 167 landoj laŭ la demokrati-indekso de la ĵurnalo *The Economist*.⁹

La fakto kaj konkludo estas, ke Putin senskrupule utiligis la instrumentojn de la demokratio por senskrupule starigi sian aŭtokratiisman sistemon aŭ, alimaniere dirite, por parte restarigi la aŭtokratiisman sistemon de antaŭaj tempoj en Ruslando. Ŝajnas, ke Putin povas fari kion li volas sen esti punita. La honesta parto de la homaro estas kondamnita komplete kapitulaci antaŭ tia fripono,¹⁰ kiu ruze sukcesis vendi ĉiujn malbonaĵojn kiel bonon.

En Okcidento neniu vere entuziasmis pri la reelekto de Putin, ĉar intertempe la tuta mondo bone komprenis, kia tipo tiu ŝtatestro estas kaj kion li faris kun Ruslando. Ĉefaj politikistoj de la nova germana registaro pritaksis la rusan elekton „maljusta“ kaj kritikis, ke ĝi okazis ankaŭ sur la aneksita teritorio de Krimeo, kio ne estas akceptebla. Ankaŭ la ministro pri eksteraj rilatoj de Svedio nomis la elekton „nedemokratia“. Aliflanke, ekzistas ankaŭ okcidentaj politikistoj kiel la germano Matthias Platzeck, kiuj rekomendas trankvilan kaj pragmatisman traktadon de Ruslando, aŭ kiuj konsilas, kiel Wolfgang Kubicki (FDP), nuligi la sankciojn, ĉar ili ĝenas la ekonomian evoluon. En Okcidento ekzistas ankaŭ ne malmultaj homoj, kiuj opinias, ke Putin ne estas tiel terura, kiel oni ĝenerale pentras lin, kaj ke oni povus ‘vivi’ kun li, se oni ĉesus konstante provoki lin per NATO-larĝigoj, enmiksiĝoj en Ukrainio, eternaj plilongigoj de sankcioj, regulaj forpeladoj de diplomatoj, novaj usonaj nukleaj bomboj, ktp. Eble lia agresemo iam finiĝus. Oni asertas, ke Putin kaj la rusoj volas nenion alian ol esti respektataj de la Okcidento kaj povi ludi saman rolon sur la internacia politika scenejo kiel Usono kaj aliaj grandpotencoj. Sed la Okcidento, precipe Usono kaj Britio, daŭre konsideras Ruslandon kiel malamikon. La Okcidento

⁸ Organizaĵo por sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo.

⁹ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Demokratieindex>.

¹⁰ Vd. la difinon de PIV.

kutime replikas kritikon el Moskvo per la atentigo, ke ĝi tute ne celas ataki aŭ provoki Ruslandon, sed nur protekti siajn aliancojn en orienta Eŭropo, ĉar ili petis tiun protekton.

Kvankam Putin, kiu fariĝis la ĉefa malamiko de la Okcidento, evidente fajfas pri demokratio kaj homaj rajtoj, kiujn en Ruslando oni ŝatas misfamigi kiel okcidentan propagandon, la tuta espero de la ruslandanoj direktas sin al tiu ŝtatestro, de kiu ili postulas aŭ atendas, ke li gvidu la landon en pli bonan estontecon. Do, Putin estos bone konsilata ne ignori la argumentojn, kiujn liaj rivaloj en la prezidenta elekto prezentis, kvankam ili ricevis relative malmultajn voĉojn el la popolo. Ke Putin, kiu praktike okupiĝas nur pri ekstera politiko kaj armea defendo kaj ŝajne perdis sian intereson pri ĉio cetera, volos kaj povos fari tion, oni povas dubi. Ĉar por fari tion necesus, ke la politika sistemo (aŭ kulturo) de Ruslando kaj la politika tono en tiu lando ŝanĝiĝu, kio kun Putin verŝajne ne okazos, ĉar lia malamo rilate al la Okcidento kaj la opozicio estas tro granda. Tiujn cirkonstancojn kaj problemojn provas analizi kaj klarigi la ĉi-sekva artikolo.

Kial Navalnyj estas danĝera?

La (evidente politike motivata) forpuŝado de Navalnyj de la antaŭ-elekta procezo fare de la helporganoj de la putinisma „demokrato“¹¹ pere de dubindaj juraj rimedoj kaj pravigoj estis atendebla. Navalnyj, kies nomo en Ruslando prefere ne estu menciata, ne hezitis taksi la prezidentan elekton farso, ĉar la rezulto, kiu kandidato gajnos ĝin, estis klara kaj certa jam antaŭ la elekto. Al Navalnyj restis do nur alvoki siajn apogantojn bojkoti tiun baloton. Sed aliaj politikistoj kiel Javlinskij de la partio „Jabloko“ trovis la bojkot-alvokon maltaŭga rimedo por kontraŭbatali la kandidaton Putin.

Sed kial la putinistoj volis eviti, ke la plej aktiva kaj konata opoziciulo de Ruslando partoprenu en tiu baloto, kvankam laŭ la prognozo de diversaj rusaj politikaj observantoj Navalnyj estus ricevinta ne pli ol 2-6 procentojn de la voĉoj, dum Putin povis antaŭvidi sian plenan venkon surbaze de populareco de pli ol 80 procentoj. Nu, en la kazo de la 41-jara juristo kaj blogulo temas pri verva, malalgrabra kaj obstina kritikisto, kiu regule vekas atenton per siaj sensaciaj publikaj agadoj kaj precipe per ruzaj esploroj de la putinisma sistemo, en kiuj li malkovras ampleksan korupton en granda dimensio, suspektindajn rilatojn inter (koruptaj) politikistoj kaj (koruptaj) komercistoj kaj fuŝan ekonomiadan ĝenerale. Krom tio, Navalnyj kapablas mobilizi homamasojn, ĉefe pere de la interreto, kiuj iras protestadi surstrate, kiel montris pluraj ekzemploj de la pasinta tempo, ne nur en Moskvo, sed ankaŭ en multaj aliaj urboj de la landego. Ĉiuj tiuj aktivecoj signifas grandan ĝenon por la putinismaj regantoj, kiuj timas tiajn scenarojn kiel en diversaj respublikoj de la iama sovetia bloko, kiuj imprese montris, al kiu malbona situacio tiaj tumultoj povas konduki, ekzemple en Kartvelio aŭ Ukrainio. Tia scenaron la putinistoj volas nepre eviti kaj tial preferas dekomence subpremi kaj sufoki ĉiuspecan „ekstersisteman“ opozicion per ĉiuj rimedoj. Por timigi la organizon de Navalnyj, la polico kaj justico de Ruslando regule ĉikanas lin kaj liajn kunlaborantojn per arest- kaj monpunoj, plej laste fine de januaro 2018, kaj la 22an de februaro la arestado de Navalnyj ripetiĝis. Eĉ se Putin ne havas kialon por timi lin kiel konkurenton, la celo de la Kremlo do evidente estas lia totala elŝaltado el la politiko. Iuj aliaj kritikistoj eĉ estis fizike likviditaj de menditaj murdistoj, kio rememorigis la metodojn de la itala mafio. En kaj ekster Ruslando multaj homoj kredas, ke Putin mem troviĝas malantaŭ ĉiuj tiuj politikaj murdoj, kiuj okazis en Ruslando dum lia regadotempo kaj en kiuj pereis multaj kritikemaj ĵurnalistoj, inkluzive de Politkovskaja ĝis Nemcov.¹² En la tempo de Putin/Medvedev en Rusio estis mortigitaj 144 ĵurnalistoj, pri la sennombraj kazoj de kaŝitaj minacoj kaj agresoj kontraŭ aliaj ĵurnalistoj ni tute ne parolu. Sed ĝis nun neniu sukcesis pruvi al Putin iun ajn formon de partopreno en aŭ scio pri tiuj krimoj, kaj malgrau tiuj suspektoj Putin daŭre ĝuas grandan subtenon de la homoj en Ruslando, kio en Okcidento estas malfacile komprenebla fenomeno. En Ruslando ekzistas centoj da politikaj prizonuloj kaj ĉirkaŭ ducent aliaj personoj, kontraŭ kiuj estis lanĉita jura proceso pro iuj agadoj en la interreto, kiuj ne plaĉis al la regantoj de la Kremlo. En Britio mistere mortis pluraj rusaj elmigrintoj kiel Aleksandr Litvinenko, kiuj kritikis la Putin-reĝimon kaj pri kies mortigo oni suspektas la rusan sekretan servon, same pri la plej freŝa kazo, kiu koncernas la iaman rusan spionon Sergej Skripal kaj ties filinon, kiuj ĵus estis venenitaj en iu malgranda brita urbo. La sama sorto povus trafi ankaŭ Navalnyj mem, kiu en la pasinta tempo estis sufiĉe ofte konfrontita kun kuriozaj atencoj, kiel ekzemple ankaŭ Vladimir Kara-Murza, konata politikisto kaj ĵurnalista, kiun oni

¹¹ Pri la historio de tiu termino vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Demokratur> (germanan kaj rusan versiojn).

¹² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Anna_Politkovskaya kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Boris_Nemcov.

probable same klopodis likvidi per veneno, aŭ kiel Oleg Kaŝin, alia konata ĵurnalisto, kiu estis kruele batita kaj grave vundita de nekonataj krimuloj.¹³ Laŭ Igor Eidman, verva kontraŭulo de la Putin-sistemo kaj kuzo de Boris Nemcov, la „mortiga agentejo“ de la Putin-sistemo funkcias tiel: Ĝi mendas murdojn, poste esploras ilin mem kaj kondamnas la menditajn murdistojn. En la tuta mekanismo estas envolvitaj altrangaj ŝtataj funkciuloj kaj anoj de gvidaj organoj de la justico, dum ĉeĉenoj ofte funkcias kiel ekzekutistoj. Sed kutime oni esploras nenion kaj akuzas aŭ kondamnas nenion. Tial tre malofte iĝas konate, kiuj estis la veraj murdistoj aŭ kiu donis la ordonojn al ili. Flanke de la Putin-administracio regas totala silento pri tiuj incidentoj. La plej nova jarraporto de Amnestio Internacia denove akre kritikis Ruslandon, ĉar perforto kontraŭ diversaj homoj kaj homgrupoj estas sisteme aplikata, precipe en Norda Kaŭkazo.

En Ruslando ekzistas nemalmultaj civitanoj, inter ili kelkaj kuraĝaj virinoj,¹⁴ kiuj komprenis la drastan maljustecon, kiu regas la socion kaj disvastiĝas kiel kancero, sed al ili komplete mankas publika platformo en la televido por efike diskonigi siajn vidpunktojn kaj plendojn. Krom tio, ili devas timi, ke ili estas ĉikanataj, persekutataj, arestataj kaj punataj de la „organoj“ de la putinisma reĝimo, kiu ne toleras „alvokojn al ribelo“ kaj „kampanojn kontraŭ la ŝtato“. Pro tio la popolo preferas silenti, ĉar vivo sen kritiko estas pli facila. La karaktero de la 65-jara orgojla kaj venĝema eks-ĉekisto Putin,¹⁵ kiu kondutas laŭ moralo foje milda, foje kruela, laŭ konduto foje ĝentila kaj ĉarma, foje kruda kaj aroganta, cinika aŭ flata-hipokrita, estas tiel formita, ke li eltenas nul kritikon kontraŭ siaj ŝtato kaj persono kaj do reagis per rimedoj, kiujn li konsideras adekvataj. Ajna malfavora kritiko de ekstere aŭ interne makulas la reputacion kaj prestiĝon de Ruslando kaj minacas la pozicion de Putin. En tia vertikale organizita hierarkia ŝtato, kiu pli similas al la civilizo de la Oriento ol al la moderna okcidenta demokratio, la regantoj ne atendas kritikon, sed postulas lojalecon kaj submetiĝon de la civitanoj al la supera ĉefo, kiu senkompatate malamas siajn malamikojn kaj protektas siajn amikojn, kvankam en la lando neniu ŝatas ilin.

Lev Gudkov

Alia admirinda aktivulo, kiu estas altgrade malagrabra por la reĝimo de Putin, nomiĝas *Lev Gudkov* (nask. 1946). Li estas elstara, internacie respektata sociologo, kiu observas kaj analizas de jardekoj la politikan evoluon en Ruslando, por ofte veni al esence aliaj rezultoj kaj konkludoj ol disvastigitaj de la oficialaj instancoj de la Kremlo.¹⁶ La okulfrapaj, kelkfoje sensaciaj statistikoj, analizoj kaj interpretoj de Gudkov kaj de liaj fakaj kunlaborantoj estas konsiderataj kiel seriozaj kaj sendependaj, pro kio ili ricevas multan atenton ankaŭ en eksterlando. Bedaŭrinde, ankaŭ Gudkov devas elteni ĉikanojn flanke de la ŝtataj organoj, kiuj evidente malŝatas kaj suspektas lian gravan laboron, kiu estas totale prisilentata de la televido. Antaŭ nelonge ankaŭ lia instituto, la internacie renoma „Levada-Centro“, estis deklarita de la ŝtato kiel „eksterlanda agentejo“,¹⁷ kio signifas, ke la laboro de la oficejo de Gudkov estos pli severe observata kontrolota kaj malfaciligata. Ekzemple, kiel „eksterlanda agentejo“ la „Levada-Centro“ ne rajtis publikigi la rezultojn de propraj enketoj antaŭ la balota tago (en kiuj Gudkov konstatis malfortan volon de la homoj partopreni en ĝi). Ĝia honorinda fondinto Jurij Levada (1930-2006), kiu verkis verŝajne la plej bonan kaj signifan sociologian studon pri la trajtoj de la sovetiaj homoj, estis stigmatizita kiel herezulo jam en la sovetia tempo.¹⁸ La centro do povas esti fermita en ajna momento per arbitra decido, plej ofte financaj kriterioj servas kiel preteksto por ŝtata interveno, kvankam la veraj motivaj estas pure politikaj. Malgraŭ malhelpoj, en la kazo de la „Levada-Centro“ la reĝimo probable tamen evitos haltigi la laboron de Gudkov, ĉar ĝi estas la sola fidinda enketa, analiza kaj statistika fonto por la regantoj, kiuj

¹³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Oleg_Wladimirowitsch_Kaschin.

¹⁴ Ekzemple Svetlana Gannuŝkina, vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Swetlana_Alexejewna_Gannuschkina, <https://www.youtube.com/watch?v=fIXAini24K4> kaj <https://memohrc.org/ru/video/svetlana-gannushkina-mirnaya-chechnya-eto-tolko-dekoraciya>.

¹⁵ Havante interesajn materialojn, mi intencas verki artikolon pri la iamaj KGB-anoj, kun kiuj Putin kunlaboris dum sia deĵorado en tiu organo.

¹⁶ La ĉefa oficiala statistika servo de Ruslando estas VCIOM. Kiel Igor Eidman rimarkigis en sia libro pri Putin, la dungitoj de ĉi tiu oficejo tute ne interesiĝas pri politiko aŭ sociologio, sed unuavice pri la generado de pozitivaj statistikaj indikoj por favore pravigi la politikon de la Putin-reĝimo. Forta riproĉo!

¹⁷ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Levada-Zentrum>.

¹⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Russian_foreign_agent_law.

povas ekscii tra tiu kanalo kion la civitanoj en Ruslando efektive pensas kaj kredas.¹⁹ La situacio de la „Lewada-Centro“ eble similas al tiu de la konata periodaĵo *Novaja gazeta*, kiu regule provizas la legantojn per nemalhaveblaj raportoj kaj interesaj komentoj, pri kiuj verŝajne eĉ la Kremlo kaj la registaro ne povas rezigni, se ili volas esti aktuale informitaj. Ankaŭ tiu respektinda gazeto estas konstante minacata de la fermo aŭ likvido, kvankam tio ial ankoraŭ ne okazis.²⁰ En lando, kie la gazetoj, radio kaj televido estis se ne komplete egalŝaltitaj kiel en Ĉinio aŭ Nordkoreio, do tamen sub forta politika premo, la redakcioj praktikas memcenzuron por eviti intervenon de la ŝtataj organoj por tiel tamen daŭrigi la ĵurnalsman laboron. Ekzistas tabuitaj temoj kiel kritiko pri Putin, la Kremlo, centraj superaj organoj kaj funkciuloj, sekretaj servoj k.s., kiuj havas enorman influon en la regionoj, kie ili praktike sufokas ĉiuspecan opozicion. La tuta kampo de la politiko estas komplete forbruligita, kiel Gudkov, kiu verkis gravajn kontribuaĵojn pri la fatala evoluo de la Putin-ŝtato, karakterizas la politikan realecon de Ruslando. Nu, pli malpli memstaran kaj aŭtentikan ĵurnalsmon praktikas ankoraŭ gazetoj kiel *Nezavisimaja gazeta*, *Vedomosti*, *Kommersant*, *Novaja gazeta* k.a., kiuj publikigas legindajn artikolojn, kies kvalito ofte ne estas pli malbona ol tiu de artikoloj en okcidentaj gazetoj.

La rolo de la televido kaj interreto

La plej gravan rolon por la disvastigo de oficialaj informoj kaj vidpunktoj ludas la ŝtata televido, kiu esence servas kiel parolilo de la Kremlo kaj registaro, kiel dum la sovetia tempo. 80-90 procentoj de la homoj en Ruslando, ĉefe 46-60-jaraj kaj pli aĝaj, spektas tiun televidon, averaĝe po kvar horoj ĉiutage, kaj precipe vespere post la laboro, kiam ĝi elsendas la ĉefajn novaĵojn. La spektantoj emas kredi kaj fidi la versiojn de la ŝtata televido, kie ili vidas kaj aŭdas praktike nur la vizaĝojn kaj voĉojn de la Kremlo, sed neniam homojn kiel Navalnyj, Gudkov aŭ aliajn sendependajn agantojn, kiuj estas sisteme ekskluditaj de la publika percepto. Oni apenaŭ povas imagi, kio okazus en Ruslando, se la politika diskurso en tiu ĉi lando okazus laŭ sama demokratia kaj kritika maniero kiel en Germanio aŭ Svislando. Tiel, ideale formiĝas la opinio de la popolo laŭ la gusto kaj deziro de la regantoj kaj ŝtataj propagandistoj. Elstaraj ekzemploj estas ĉi-rilate la elsendoj de Andrej Kondrašov, Dmitriĵ Kiseljov kaj Vladimir Solovjov, la plej „akraj hundoj“ de la rusa televido, kiuj suke klarigas la mondon el rusa vidpunkto kaj invitas gastojn, kiuj polemike kriaĉas precipe kontraŭ Eŭropo, Usono kaj Ukrainio.²¹ Putin mem eĉ ne devis aparte klopodi kiel kandidato dum la elekta kampanjo, ĉar la ŝtata televido prizorgis tiun laboron por li. Putin povis limigi sian „kampanjon“ esence al la vizito de kelkaj fabrikoj kaj al grandskala elpaŝo en iu stadiono en Moskvo kelkajn tagojn antaŭ la balota dato por disvastigi kelkajn efikajn freŝajn bildojn tra la televido. Tio sufiĉis por impresi la homojn, la resto estis antaŭpreparita materialo, kiel en vilaĝo de Potjomkin. Ankaŭ la moderatoroj de la koncernaj elsendoj faris nenium provon kritike trakti la kandidaton Putin, kiu, kiel dirite, estas nekritikebla. Male, la televido prezentis longan dokumentan filmon pri Putin, en kiu li devis postlasi plej pozitivan impreson. La kampanjo de la prezidenta elekto do okazis grandparte en la televido. Ĉar la ŝtataj kanaloj, esence temas pri RTR, kiuj estas tro propagandecaj kaj unuflankaj, tro malbone aŭ nekomplete informas la homojn pri la okazaĵoj en Ruslando kaj la mondo, la interreto ludas pli kaj pli gravan rolon kiel konsultinda alternativa informfonto kaj por la politikaj diskutoj kaj agadoj. Ĝin la Kremlo ege timas, sed ial ankoraŭ ne tiel traktas kiel en Ĉinio, kie la internacia reto estas totale cenzurata, praktike blokita kaj nealirebla, kvankam la kreskanta meza tavolo en grandaj kaj malgrandaj urboj kaj en la kamparo jam povas utiligi almenaŭ la internan ĉinan reton. Ĉar la aliro al la interreto mankas en vastaj regionoj de Ruslando, la Kremlo konsideris ĝis nun nenecese subpremi kaj cenzuri ĝin. Kiel montris la rezulto de la ĵusaj ruslandaj elektoj, la politika opozicio povis nur malmulte profiti de la interreto por ricevi signifan kvanton da voĉoj.

Sendube, la putinisma propagando havos sian celatan efikon. La ukraina politologo Anton Ŝeĥovcov konfirmis, ke la propagando de la malamo profunde enradikiĝis en la psiko de pluraj generacioj de ruslandanoj, kun longdaŭraj sekvoj. Cetere, la rusa propaganda maŝino, kiu ĉefe celas

¹⁹ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Lewada-Zentrum>, https://de.wikipedia.org/wiki/Lew_Dmitrijevitsch_Gudkow.

²⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Nowaja_Gazeta.

²¹ Kvankam la informado estas ĝenerale pli libera kaj malpli propagandeca, „mainstream“-raportadon okazigas ankaŭ kva-zaŭ-ŝtataj televidaj kaj radiaj kanaloj en aliaj landoj, kiel kritikistoj de tiaj televidostacioj rimarkigis, ekzemple en Germanio, Aŭstrio aŭ Svislando. La rusoj perfekte kopiis tiujn formatojn, kiujn ili adaptis al la propraj bezonoj de la informado kaj propa- gando por klarigi la eventojn el rusa vidpunkto. Ĉar la okcidentaj televidaj kaj radiokanaloj kaj gazetaraj grandparte kritike kaj negative raportas pri Ruslando, la ruslandaj amaskomunikiloj faras reciproke la samon pri la Okcidento.

altigi la reputacion kaj prestiĝon de Ruslando en la mondo, ne limigas sian laboron nur al Ruslando mem; en Okcidento iĝis konate, ke specialaj rusaj agentejoj dungis centojn da troloj por subfosi la okcidentan gazetaron per reagaj komentoj, kiuj celas apogi la pozicion de la Kremlo kaj tiel semas konfuzon kaj kaoson ĉe la okcidenta publiko. Usono reagis per akuzo de la respondeculo de tia agentejo (en Sankt-Peterburgo), kiu klopodis influi la prezidentan elekton en Usono malfavore al Hillary Clinton por helpi la venkon de Donald Trump (sed la vereco de tiu tuta afero estas kontestata). Krom tio, la Kremlo klopodas utiligi diversajn ekstremdekstrajn partiojn en Eŭropo (kiel Front National,²² Lega Nord, FPÖ, Orbán) kiel komplicojn por sia kontraŭ-eŭropa agado, pri la turko Erdogan, kun kiu Putin ŝajne flegas grandan amikecon, ni tute ne parolu.. Rigarde al la malfacila politika situacio en diversaj eŭropaj landoj, la putinistoj ĝuegas moki pri la „kaoso“ en EU, kiu estas perceptata kiel speco de malamiko, kvankam oni parolas pri „partnero“, kaj maltrafas neniun okazon por kompromiti kaj diskrediti la okcidentan demokration por pravigi la propran sistemon. Ĉiujn okcidentajn riproĉojn kaj akuzojn la rusaj politikistoj aŭtomate rifuzas kiel sensignifan „palavron“, „inventon“ kaj „mensogon“, eĉ kiel „rusfobian kontraŭ-rusan histerion“, se temas pri la respondeco por la sport-dopingo aŭ la provo influi elektojn en fremdaj landoj, pri la kulpo pri supozataj militkrimoj de Ruslando en Ukrainio kaj Sirio aŭ la aktiveco de la rusa kiberspionado kaj -atakado, probable entreprenata de diversaj rusaj sekurecaj servoj kaj konspiraj agentejoj, kiu ege kreskis lastatempe. Putin elsendis neniujn signalojn por montri, ke li malaprobas tiajn farojn. En diversaj landoj (kiel Afganio kaj Sirio) Ruslando milite enmiksiĝas sub la preteksto de la batalo kontraŭ la terorismo, kvankam la ĉefa celo de Moskvo estas fortigi siajn geostrategian pozicion kaj politikan influon en tiuj landoj, kiel en la sovetia tempo. Irano estas traktata kiel amika partnero. En la Sekureca Konsilio de UN Ruslando kutime sabotas kaj blokas ĉiujn paciniciatojn de la membroŝtatoj, kiuj ne plaĉas al la regantoj en Moskvo, je la granda konsterniĝo kaj ĉagreno de la internacia komunumo.

Putin kiel simbola figuro, kiu ĉiam sukcesas kaj ĉiam pravas

Laŭ iu enketo, Putin estas internacie pli populara ol la papo aŭ Dalai Lama. Laŭ alia enketo, vere pozitive vidata Putin estas nur en Ĉinio kaj Vjetnamio. Sed oni ne forgesu, ke ankaŭ en Okcidento li havas multajn admirantojn. Iom naive, *Forbes*, *Time* kaj *Spiegel* kaj *Profil* (Aŭstrio) deklaris Putin plej sukcesa ŝtatgvidanto de la mondo. En 2017 li ricevis la „venezuelan pacpremion“. Putin estas honora prezidanto de la monda asocio de la ĵudo. Kvankam temis pri gravaj lezoj de la internacia juro, la organizitaj amasoj bizare jubileas (antaŭ la televida kamerao) pri historiaj triumfoj (en Krimeo kaj Sirio), kio postlasas en eksterlando ambivalentan impreson. En Ruslando oni fajfas pri respektado de la homaj rajtoj. Anstataŭ por la nobelpremio pri paco, Putin povus esti taŭga kandidato por la Haga tribunalo pri militkrimoj, kiu devus esplori lian eventualan respondecon pri militkrimoj en Ĉeĉenio, Kartvelio, Ukrainio kaj Sirio.

Kiel Gudkov plue klarigas, la sukceso de Putin apogas sin je du principoj: Unue je la sento de la senalternativeco, ĉar Putin restis sen reala konkurenco. Sed en Ruslando ekzistas ankoraŭ aliaj politikistoj, kiuj estas saĝaj kaj povas tiel bone, klare kaj klare paroli kiel Putin. Due, la reĝimo apogas sin je la propagando mesaĝo, ke Putin redonis al Ruslando la statuson de grandpotenco. Krom tio, la ekonomio konsiderinde pliboniĝis kompare kun la tempoj de Gorbaĉov kaj Jelcyn. Tio multaj rusoj dankas al Putin, pro kio ili alergie reagas al kritiko kontraŭ li.

Sed ĉu la menciitaj elementoj de la propagando, ekzemple tiu pri la grandpotenco, vere gravas por la homoj en Ruslando? Laŭ Gudkov, jes. Ankoraŭ en la erao de prezidento Jelcyn oni povis observi tri ĉefajn dezirojn de la ruslanda popolo al la adreso de la ŝtato: Ĉesigo de la ekonomia krizo kaj de la milito en Ĉeĉenio kaj reaktiro de la statuso de monda grandpotenco. Ĉi-lastata afero estas esenca por la ruslandanoj, ĉar ili povas senti sin situantaj sur la sama nivelo kiel Usono kaj Ĉinio (kvankam tio nature estas nura iluzio). En la sovetia tempo regis la opinio, ke Ruslando estis respektata, ĉar eksterlando timis ĝin. Per la kolapso de Sovetunio ekestis forta sento de senvaloreco, ke oni perdis tiun statuson. La sento esti grava mondpotenco rekompencas la senton de la mankanta socia sekureco, de la mizero kaj malriĉeco kaj de la senhelpeco en la rilatoj kun la arbitraj ŝtataj instancoj. Putin majstre eluzis tiun vakuon kaj mesaĝis al la ruslandanoj, ke ili povas fieri pri sia lando, kiu denove fariĝis granda potenco. Lige kun tio oni nun povas observi la rehabilitadon de specifaj elementoj de la sovetia tempo, ekzemple

²² Kiu devis ricevi de iu rusa banko 9 milionojn da eŭroj kiel krediton. Ĉar la banko intertempe bankrotis, la mono estis deponita ĉe iu obskura firmao en Moskvo.

la diskreditado de la demokratio kaj de la universalaj valoroj de la homaj rajtoj, de Stalin kiel forta gvidanto dum la dua mondmilito, kvankam li portis la ĉefan respondecon por la milionoj da sovetaj viktimoj. k.a. Kun tio estas ligita ankaŭ la opinio, ke Ruslando estas ĉirkaŭata de malamiko kaj ke ĝi iras propran vojon, kiu havas nenion komunan kun la okcidenta modelo. Laŭ Gudkov, per tiu sinteno la putinistoj celas diskrediti ankaŭ la liberalan parton de la popolo, kvankam tiu parto ne estas aŭtomate okcidentema, pri kio atentigas eĉ la konata rusa filmproduktisto Karen Ŝahnazarov, unu el la plej fanatikaj adorantoj de Putin kaj akraj kritikantoj de la Okcidento, kiu konstante aperas en la rusa televido.

La registaro malfidas la popolon kaj la popolo malfidas la registaron

Sed la populareco de Putin, ĉirkaŭ kiu okazas stilizita arteficiala personkulto,²³ povos denove fali, se mankas novaj sukcesoj kaj atingoj, precipe militaj, kiel tiu vakuo evidentiĝis inter 2010 kaj 2014. La mito pri la granda populareco de Putin, kiu estas pure propaganda truko, havas malmulton komunan kun la realeco de la ruslanda socio, kiu tradicie malfidas al ĉiuj regantoj, kiuj siaflanke malfidas la popolon. Nature, Putin havas ne malmultajn sincerajn adorantojn, apogantojn kaj elektantojn, eble 30-50% de la popolo. Sed Putin estas precipe simbola figuro, kun kiu ligiĝas kelkaj esperoj de la rusoj, kiel atentigas la rusa politologo Ekaterina Ŝulman- Zaslavskaja. La prezidenteco de Medvedev montris, ke Ruslando povas funkcii ankaŭ sen Putin (kiel prezidento), eble eĉ pli bone. Sed Medvedev estis kaj estas malrespektata de la rusoj kiel malforta ŝtatestro. Fakte nur Putin kapablas plenumi tutajn sportstadionojn, kiel se aperus Michael Jackson, Madona aŭ la papo, do Putin estas fenomeno kun aparta aŭreolo. Ĉar en Ruslando mankas honesta publika opinio, estas malfacile taksii la veran subtenon por tiu aŭ alia politikisto aŭ partio. Ju pli granda estas la politika premo de la ŝtato kontraŭ la civitanoj, des pli malsincere kaj false ili respondas, ĉar ili timas doni honestan respondon. Ankaŭ en ĉi tiu kazo la memcenzuro plene funkcias. Pro tio neniu sociologia statistiko aperanta en Ruslando estas centprocente fidinda.

Ŝulman, kiu karakterizas la rusan politikan sistemon kiel hibridon inter aŭtokратиismo kaj demokratio, klarigas, ke en sistemo, en kiu mankas konkurenco, estas malfacile mezuri la popularecon de konkreta politikisto. Putinon ŝi komparas kun unusola sportkuranto, kiu partoprenas en konkurso, ĉe kiu estas komplete malgrave kiam ekzakte li atingas la celon, ĉar ĉiukaze li staros sur la unua rango de la podio. Tia situacio estas interpretata kiel populareco. Se ekzistus sistemo de la libera politika konkurenco, tiu populareco havus tute alian vizaĝon. Per aliaj vortoj: la elektantoj de Putin en Ruslando trompas sin mem.

En tiu tuta priskribita konstelacio la sensaciaj malkovraj agadoj de Aleksej Navalnyj pri la luksaj vilaoj de ĉefministro Medvedev ludas ŝajne neniun gravan rolon – ankaŭ tiu ĉi temo estas oficiale severe tabuita – , kvankam la retfilmoj de Navalnyj estis spektitaj de takseble 25 ĝis 50 milionoj da homoj. Nu, post tio Medvedev eble fariĝis ankoraŭ malpli ŝatata, sed en Ruslando oni neniam serioze konsideris aŭ ŝatis lin, ĉar, kiel dirite, li impresas kiel malforta politikisto, kvankam li lanĉis nekutime akran kritikon de la putina sistemo en Ruslando, kiam li estis prezidento. En demokratia lando li estus verŝajne jam delonge forigita de sia ofico, sed Putin konservis lin, ĉar li evidentiĝis fidinda „kamarado“. Tamen, en marto 2017 okazis amasprotestoj kontraŭ Medvedev. Tipe por aŭtokратиismaj reĝimoj estas, ke la kolero de la popolo ne direktas sin unuavice kontraŭ la sultano aŭ caro mem, kiu ne estas tuŝebla, sed kontraŭ la grandveziro aŭ la bojaroj. Do, en Ruslando la kolero trafas la registaron kaj eventuale la ĉirkaŭaĵon de Putin, kiu devas ludi la kulpokapron, sed ĝi neniam koncernas Putin persone, kiu enradikiĝis en la konscion de la homoj kiel ĉiurilate kompetenta gvidanto, kiu ĉiam konas la taŭgan respondon por ĉiu tikla demando kaj kiu ĉiam pravus. Laŭ Vera Gureviĉ, aŭtorino de memuaro pri la lernejoj de Putin, kiu instruis al li la (malŝatatan) germanan lingvon, Putin estas homo kun elstara karaktero, alta moralo, kvazaŭ genio. Vladimir Ĉurov, antaŭa prezidanto de la Centra Elekta Komisiono (2011-16),²⁴ eĉ diris, ke la ĉiama praveco de Putin estas por li „leĝo“. Sian popularecin Putin utiligas por montri, ke li estas pli saĝa ol ĉiuj ceteraj kaj ke li eĉ kapablas trompi ĉiujn aliajn. Kvankam multaj homoj en Ruslando kredas, ke Putin mem apartenas al la sistemo de la korupto kaj organizita krimo, kun kiu laŭ Javlinskij estas ligita ankaŭ la internacia terorismo, tio ne ŝanĝas ilian (pozitivan) rilaton al li. Se do iu usona

²³ Subtenata de diversaj naivaj kaj nekritikaj biografioj de Roj Medvedev, Oleg Blockij, Vera Gureviĉ, Aleksej Ĉadaev k.a.

²⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Wladimir_Jewgenjewitsch_Tschurow.

parlamentano nomas Putin „gangstro“, en Ruslando tio ne kaŭzas konsterniĝon pri Putin, kiu en Ruslando estas konsiderata kiel speco de sanktulo.

Ŝajnas, ke en Ruslando komplete mankas imago pri tio, ke la regadosistemo povus esti aŭ fariĝi alia. Putin regas Ruslandon kiel „teflona“²⁵ prezidento jam de 18 jaroj,²⁶ kaj la homoj komprenis, ke plej verŝajne li restos ankaŭ la venontajn ses jarojn aŭ eĉ pli longe. Sur tiu bazo estas klare al ili, ke oni povas ŝanĝi nenion kaj devas esti kontenta pri tio, kion oni havas. Ĉe la plimulto de la popolo ne ekzistas indikoj, ke oni pretus persone aktiviĝi por ŝanĝi ion ajn. Tiuj, kiuj ne estas kontentaj, simple rifuzas partopreni en balotoj kaj restas politike pasivaj. La instituto de Gudkov konstatas de jaro al jaro malpliigon de la partopreno en la elektoj, due kreskantan malfidon je la balota procezo. La plimulto de la homoj konsideras la balotojn malhonestaj kaj speco de teatro, aŭ farso. Ilin partoprenas ĉefe politike interesataj aktivuloj, apogantoj de Putin, konformistoj, oportunistoj kaj profitantoj de la Putin-reĝimo, kvankam tiuj balotoj kaj elektoj estas regule manipolataj kaj falsataj, laŭ Gudkov je 5-8 procentoj. Sed tiu diferenco ne tro influas aŭ ŝanĝas la finan rezulton en si mem. Malgraŭ tiu trompado, Putin, kiu ĉi-foje aperis kiel „sendependa“ kandidato, kvankam li apartenas al la ‘ŝtata’ partio „Unueca Rusio“, ricevis sufiĉe grandan kvanton da voĉoj por povi konservi la oficon, kvankam la kvoto de la partopreno ne estis tiel alta kiel dezirate de la Kremlo.

Ankaŭ la junularo kaj intelektularo apogas la putinisman reĝimon

Kaj kio pri la junaj generacioj? Laŭ Gudkov estus iluzie kredi, ke la junularo ne apogas la Putin-reĝimon. Male, laŭ kalkulo de la Levada-Centro, inter rusoj 18-24-jaraĝaj la aprobo de Putin estas 86 procentoj. La gejunuloj de Ruslando apartenas al la plej grandaj simpatiantoj de Putin, kiel montris ekzemple la organizaĵo „Naŝi“ (kiun kritikistoj moke nomas „Putin-junularo“ alude al la iama „Hitler-junularo“) aŭ la patriotisma „Juna armeo“ („Junarmija“), kiu estis starigita de defendministro Ŝojgu en 2016 laŭ dekreto de Putin de oktobro 2015. Ĉi-lastata organizaĵo konsistas, laŭ propraj indikoj, el ĉirkaŭ 200'000 anoj, kiuj estas inter 8- kaj 18-jaraĝaj.²⁷ Membri en tia armeo signifas grandan honoron kaj fieron. Tiuj gejunuloj, kiuj volas esti „digna generacio“ por Ruslando, trovas Putin bona prezidento. La militon ili dume ekzercas per komputilaj programoj. La 9an de majo 2017 tiu juna armeeto paradis sur la Ruĝa Placo, inter la soldataro kaj armilaro, kiu estas kutime prezentata en tia okazo. En la 2000aj jaroj en Ruslando estiĝis pli ol 6000 novaj armeaj-patriotismaj grupiĝoj. La kulmino de tiu movado estis atingita post la anekso de Krimeo en 2014.

Aliflanke, en la grandurboj aperas nova tavolo de la „meza“ klaso (de kelkaj procentoj), kies anoj havas pli demokratian sintenon kaj komprenas la danĝerecon kaj senperspektivecon de la aŭtokratiisma Putin-kurso, kiu konas neniujn skrupulojn kaj agas rande de la krimeco. Sed tio estas minoritato ĉe la junularo inter 25 kaj 30 jaroj. Al tiu tavolo aliĝis studentoj kaj lernejanaj, kiuj apartenas al la „Putin-generacio“, kiu konas neniun alian prezidenton ol Putin (plus Medvedev kaj Lavrov). Laŭ Vera Gureviĉ gravas, ke la junularo de Ruslando restu disciplinita, morale kaj patriotisme edukita. Ĉi tiu generacio ŝajnas esti ankaŭ relative kontenta pri la aktuala situacio en Ruslando, ĉar malagrablaj fenomenoj kiel malsato, mizero, totalisma subpremo aŭ milito kiel dum la komunisma tempo forestas. Tamen, ekzemple en la televida elsendo „Rekta linio kun Vladimir Putin“, kie li donas kiel respondojn mikson de oficialaj vidpunktoj kaj personajn opiniojn, diversaj homoj plendas pri la gravaj problemoj en la lando, sed Putin, kutime donante longajn detalajn respondojn, kiuj enhavas multajn promesojn por trankviligi la homojn, konfirmas tiajn malfacilojn sed emas rifuzi la personan respondecon, kiun li ŝovas al la registaro, al la Okcidento en la kazo de la sankcioj aŭ al Ukrainio en la kazo de la rus-ukraina konflikto. La sistemaj malhonesteco kaj mensogemo de Putin estas evidentaj ankaŭ en tiuj kazoj. Ankaŭ la eterna ekonomia optimismo de la pseŭdointelekta popolisto Putin estas nura sablo en la okulojn de la homoj en Ruslando. Ŝajnas, ke en Ruslando ankoraŭ ne ĉiuj homoj komprenis, kian karakteron havas la Putin-reĝimo. De kelkaj jaroj en la lernejoj de Ruslando la ideologia premo eĉ estis fortigita per patriotisma edukado, kiu propagandas religiajn-ortodoksajn valorojn kaj kontraŭ-okcidentan

²⁵ Teflono estas materialo, sur kiu nenio gluiĝas.

²⁶ En 2008-12 li estis ĉefministro, kiam Dmitrij Medvedev anstataŭis lin kiel prezidento.

²⁷ Laŭ aliaj ciferoj, fine de oktobro 2016 tiu „armeo“ havis 26'000 membrojn en la aĝo de 11-18 jaroj. En aprilo 2017 al ĝi apartenis jam 70'000 gejunuloj, en junio 2017 estis nombritaj 117'000 membroj kaj en septembro 2017 ekzistis pli ol 160'000 (vd. <https://ru.wikipedia.org/wiki/Юнармия>).

konservativismon, kio ĝenerale falas sur fekundan grundon. Ĉe iu parto de la junularo tiu premo certe kaŭzas ankaŭ negativajn reagojn, ĉar tiuj homoj ne ŝatas mensogojn, demagogion, korupton, devigon k.s., do ili ne kredas ĉion, kion la propagando disvastigas. Ŝajnas ke ĝuste tiuspeca junularo protestis surstrate, sed ne ĉiuj, kiuj volis, iris, ĉar ili timis gravajn sekvojn. La polica ŝtato de Putin disponas pri enorma kvanto da diversaj sekurecaj fortoj por timigi, limigi kaj, se necese, amase aresti potestantojn kaj opoziciulojn. Fakte, multaj partoprenantoj estis kaptitaj de la polico kaj malaperis en prizonoj. Sed la protestemaj grupoj estas tro malgrandaj, fakte sensignifaj kiel bazo por ĝenerala ribelo. Se oni konsideras la ciferojn de partoprenantoj en protestoj en Moskvo, 25'000 homoj estas relative malgranda nombro kompare kun la nombro de la loĝantoj de la ruslanda metropolo, kiu estas 15 milionoj. Multaj homoj decidis rezigni pri protestoj, ĉar ili opinias, ke en Ruslando ili havas neniujn pozitivajn sekvojn, do ili estas sensencaj. Malgraŭ tio, la protesta movado de la koleraj, politike vekigintaj civitanoj de Moskvo de la vintro 2011/12 sur la Bolotnaja-placo, kaŭzita ĉefe de la suspektinda rezulto de la parlamentaj elektoj, kiujn gajnis la partio de la Kremlo, kaj la ruza interŝanĝo de la prezidenta kaj ĉefministra postenoj de la „tandemo“ Putin kaj Medvedev (2008-12), kaj la protestoj de marto 2017 signifis seriozan signalon al la adreso de la regantoj, kies reĝimo ŝajne troviĝis en grava krizo de la kredindeco. En Moskvo Putin ĝuis ĝis nun malpli ol 50 procentoj de la apogo en prezidentaj balotoj, sed en 2018 la subteno al li estis surprize forta (kio estas iom stranga). En sia dua oficoperiodo, kiu estis inaŭgurita per memfiera patriotisma parolado en la Kremlo, Putin komencis propagandi sian „nacion ideon“, la „patriotismon“ kaj „eŭraziismon“, kaj la „rusan mondon“, kio estis akompanata de akra polemiko kontraŭ la malŝatata liberalisma Okcidento, kiun Putin diskreditis kiel morale degeneritan civilizon. Pli kaj pli li procedis per agresema konduto kontraŭ la ĝena politika opozicio, sed ankaŭ kontraŭ la nekonformisma intelektularo, ĵurnalistaro kaj artistaro, tiel ke en eksterlando elformiĝis la bildo de Putin kiel pruda, maltolerema aŭtokrato-diktatoro. La ĉefa simbolo kaj duma kulmino de la reprezalioj de la Putin-reĝimo, kiuj provokis internacian atenton, estis la arestado, kondamnado kaj malliberigo de la entreprenisto Miĥail Ĥodorkovskij, kiu enmiksiĝis en la politikon, kaj de la ribelema kantgrupo „Pussy Riot“, konsistanta el tri junaj nekonformismaj virinoj, kiuj protestis laŭ sia maniero kontraŭ la Putin-reĝimo kaj ĝia komplico, patriarko Kiril (Gundjaev), per skandala elpaŝo en la moskva katedralo, pro kio ili estis senditaj por du jaroj en la „gulagon“, cetere kun la beno de la rus-ortodoksa eklezio, kiu evidente refalis en la tempon de la inkvizicio.²⁸ Montriĝis, ke tiu eklezio ne plu estas nur plumpa lakeo de la politika reĝimo kiel dum la komunismo, sed emancipiĝis kiel ĝia ´egalrajta´ partnero, kun sinteno, kiu pli similas al islama fundamentalismo ol al moderna tolerado de diversaj vivo- kaj kredoformoj kiel en Okcidento.

De Paŭlo al Saŭlo

Dum en Ruslando, Ĉinio kaj Vjetnamio Putin evidente ĝuas grandan (sed tamen dubindan) popularecon, li komencis pli kaj pli malplaĉi al la okcidentanoj, kiuj tute ne ŝatis lian pli kaj pli agreseman kaj cinikan politikon, pro kio novaj konfliktoj kun Ruslando, kiu strikte rifuzas kritikon de ekstere, estis neeviteblaj. Antaŭ ĉiuj aliaj la usona prezidento Barack Obama publike demonstris sian abomenon pri Putin, kion la rusoj venĝis per daŭra polemiko kontraŭ Hillary Clinton, kies venkon en la venontaj prezidentaj elektoj la Kremlo volis eviti. Malgraŭ tio oni povas dubi, ke Donald Trump, kiu laŭdire estas la „spirita frato“ de Putin, ŝatas lin pli multe. Ĝuste inter usonaj respublikanoj troviĝas plej akraj kontraŭuloj de Ruslando. Probable neniu usonano povas ŝati kaj estimi rusojn, tiel longe kiel ili klopodas enmiksiĝi en la usonan politikon. Povas esti, ke Trump havas antaŭ la usonanoj ion por kaŝi koncerne siajn rilatojn kun Ruslando.

Ankoraŭ kiel ĉefministro de Jelcyn Putin palavis en sia intertempe forgesita „manifesto“ de la tria jarmilo, aperinta en decembro 1999 en la rusia gazetaro, pri la neceso kaj praveco de demokratiaj kaj merkatekonomiaj reformoj kiel solaj alternativoj por Ruslando, sed ankaŭ pri la bezono de la enkonduko de la jure konforma ŝtato, idea plurismo kaj libereco de la individuo kaj de la opinioj. Sed la praktika efektiveco de liaj vizioj, kiujn certe ĉiu leganto de la manifesto en Okcidento povis aprobi kaj subteni, montriĝis malfacila, nerealista projekto en Ruslando, pro kio ĝi estis dume interrompita. Kun

²⁸ Pri tiu skandalo vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Pussy_Riot. En svisa preĝejo simila ago povas esti kvalifikita kiel lezo de la rajto restadi en ejo posedata de fremda persono kaj punita, laŭ art. 186 de la svisa punkodo, per monpago aŭ enprizonigo ĝis tri jaroj (http://www.gesetze.ch/sr/311.0/311.0_019.htm).

ĉiu oficperiodo Putin fariĝis pli aŭtokrata, pli maltolerema, pli agresema, pli cinika. Eble Putin estas 'bona homo', sed kelkaj gravaj personecoj vidas lin kaj la aferojn en Ruslando en alia lumo. Jam Elena Bonner, vidvino de Andrej Saĥarov, avertis, ke Putin certe instalos modernan formon de la stalinismo, kaj efektive, ŝia prognozo montriĝis ne tute maltrafa. Iusence Putin evoluis de Paŭlo al Saŭlo, ĉefe pro seniluziigo pri la Okcidento, kiu laŭdire trompis lin kaj la rusojn kaj kiun li tial nun malŝategas. Tiun metamorfozon de Putin brile analizis Miĥail Zygar en sia aktuala libro pri la interrilatoj de la kremla roto. Verŝajne temis pri nura preteksto por ludi propran rolon kaj povi gvidi sendependan politikon. En la trajtoj de la hodiaŭa politika kulturo de Ruslando iuj vidas sintezon de stalinismo kun faŝismo, kombinita kun carismaj kaj naciismaj elementoj. Por la sociologo Igor Eidman putinismo signifas la restaŭradon de faŝisma reĝimo laŭ germana aŭ itala maniero de la 1930-40aj jaroj. Putinismo do estas faŝismo, stalinismo, imperiismo kaj ortodoksa ideologio kune en unu sistemo, kvankam la komparo de Putin kun Hitler aŭ Stalin probable estus troigo. Andrej Piontkovskij komparis la paroladon de Putin de 2014 pri Krimeo kun la parolado de Hitler de 1939 rilate la tiaman anekson de la Sudetoj fare de Germanio.²⁹ Iuj politologoj vidas paralelon kun la reĝimoj de Orbán en Hungario, Erdoğan en Turkio kaj kun la Trump-regado en Usono, malgraŭ diferencoj. Ĉu tiuj ŝtatestroj, kiuj ŝajnas havi (mal)multon komunan, lernis unu de la aliaj kaj admiras unu la aliajn?

Lige kun la elformiĝo de la „novtipa“ regadosistemo en Ruslando, Eidman, kies unika raporto pri enhavas grandiozan finkalkulon kun tiu reveninta rusa monstro, trafe karakterizis ĝin laŭ ĝiaj integraj elementoj kaj trajtoj, kiuj kunfandiĝis en la granda pota de la postkomunisma civilizo de Ruslando, kiu estas regata de la mono: „De la sovetia burokratio la nova elito transprenis la aŭtokratan regadostilon, la krudan sintenon al la homoj kaj la tipan duoblan vivstilon de la ŝtataj funkciuloj, por kiuj tipas senbrida konsumado kaj rapida karierismo unuflanke kaj fanatika predikado de patriotismo kaj ŝajna bonfarto de la lando aliflanke. De la krima mondo oni heredis la eksterleĝajn emojn kaj metodojn, la aventurisman kaj la brutalecon, la kutimon solvi demandojn per perforto, la malrespekton al la simplaj neprivilegiitaj homoj, la klaso, kiu posedas nenion. De la flanko de la sovetia inteligencio aldoniĝis la morala oportunismo, kiu moviĝas rande de la ciniko, de la abismo inter belaj vortoj kaj la realeco de la vivo, kiu konsistas el la pena ĉiutaga akaparado de pli kaj pli kostaj vivnecesaj materiaj rimedoj. Se oni ne estas pagipova, oni povas esti senkompate elĵetita el la loĝejo aŭ mizere fartas en la hospitalo, ĉar oni ne ricevas la necesajn kuracilojn. La novaj mastroj de Ruslando kreis ŝtaton, kiu funkcias laŭ la leĝoj de la krimuloj, kiuj sukcese oficialigis la korupton, kiu ebligas al la superuloj fariĝi fabele riĉaj sen devi respekti la regulojn de la leĝoj kaj sen devi pagi impostojn.“ La vivon de la nova riĉa klaso de Moskvo cetere impresis Oksana Robski en sia romano „Casual“. Postkomunisma Ruslando povas esti difinita kiel „Sovetunio sen komunismo kaj sen la iamaj nerusaj respublikoj“, kiuj tute ne plu deziras aparteni al la ruslanda regno. Post la eksperimento de la „nova sovetia homo“, kiu historie ankoraŭ ne mortis, naskiĝis la nova postsovetia homo, la tiel nomata *homo postsovieticus* de la erao de Putin, kiu evidente fariĝis eĉ pli malbona estaĵo. La iamaj apologetikuloj de la absurda teorio, ke nepre kunfandiĝos la plej bonaj ecoj de la socialismo kaj kapitalismo, tragike eraris. La vero estas, ke en Ruslando kunfandiĝis la plej malbonaj trajtoj de tiuj ideologioj. La historio de tiuj du sistemoj en Ruslando montris, ke ilia kopiado, enkonduko kaj aplikado kondukis al iliaj groteskaj misformigo, kripligo kaj perversigo, al la kompletaj tordado kaj inversigo de la originalo. Tio kaŭzis la totalan fiaskon de ĉio cetera, kion la rusoj kopiis kaj importis de la Okcidento, kontraŭ kiu ili direktas precipe la teknologion, kiun ili posedas dank' al la spionado. Eĉ la erarojn, kiujn la Okcidento faras, la rusoj kopias kaj aplikas en la opinio, ke en Ruslando oni rajtas fari ĉion, kion ankaŭ la Okcidento faris kaj permesis al si, ankaŭ la malbonajn aferojn. Kompreneble, la kulpon oni ĉiam donis al la Okcidento, kiu elpensis tiujn ideologiojn kaj trudis ilin al Ruslando. La rusoj do devos decidi, kion ili deziras. Hodiaŭ, iuj intelektuloj kiel la fantasta verkisto Sergej Lukjanenko revas pri la efektivigo de la „rusa mondo“ kiel sintezo de la plej bonaj ecoj de la Okcidento kaj Oriento.³⁰ Oni devas timi, ke ankaŭ tiu ideo restos nura fikcio. En neniu alia nacio aŭ ŝtato oni opinias, ke la „rusa modelo“ povas esti sukcesa.

²⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Andrej_Piontkovskij.

³⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Sergei_Lukyanenko.

Sistemo de burokratoj, kapitalismaj oligarkoj kaj kleptokratoj

En Ruslando do ekzistas nek socialismo nek merkatekonomie orientita kapitalismo. La realeco de la politika-ekonomia sistemo de Ruslando estas klasifikebla kiel miksitaj prezidenta-parlamentaj sistemo kun kartela (aŭ trusta) ŝtatkapitalisma strukturo, kiu estas regata kaj kontrolata de maltransparentaj korporacioj konsistantaj el Kreml- kaj Putin-lojalaj administrataj burokratoj, financaj oligarkoj kaj industriaj grandkomercistoj, inter kiuj troviĝas ne malmultaj iamaj kaj aktualaj kunlaborantoj de sekretaj servoj. La anoj de tiuj cirkloj utiligas la ŝtatan povon por certigi sian personan pozicion kaj sekurigi sian financan staton. La trian ´pilieron´ de la sistemo konsistigas plej diversaj intelektuloj, kiuj vendis sin kvazaŭ kiel prostituitojn al la Putin-reĝimo kaj povas esti iamaj komunistoj, liberaluloj aŭ adeptoj de aliaj ideologioj. Inter la anoj de ´la sistemo´ troviĝas multaj admirantoj de la Okcidento kaj Usono, kien ili ofte vojaĝis/as kaj kie iliaj familianoj vivas lukse kaj infanoj studas en universitatoj. Okcidentaj bankoj gardas ilian monon, ofte temas pri fabelaj sumoj, do milionoj aŭ miliardoj da dolaroj, kiujn ili akaparis pere de (dubindaj) privatigoj kaj vendado de resursoj (nafto, gaso, raraj kaj valoraj termetaloj kaj senmoveblaĵoj) de Ruslando kaj iamaj sovetiaj respublikoj en la internacia komerco, kiu povas inkluzivi ankaŭ armilojn, drogojn, virinojn, alkoholon kaj diversajn kontrabandaĵojn. Diversaj mafiaj strukturoj kaj organizaĵoj ekzistas kaj funkcias kiel antaŭe, same la korupto – en la statistiko de Transparency International Rusio okupas la 131an rangon de 176 landoj.³¹ Sed ĉio tio estas ĝenerale konataj aferoj.³² Do, la ŝtata kapitalismo en Ruslando estas karakterizata per tio, ke relative malgranda grupo de potenculoj (t.n. silovikoj) kvazaŭ monopolisme kontrolas la tutan monfluan en la lando, de kiu povas profiti ĉefe tiuj, kiuj kunlaboras kun la ŝtata kaj registara burokratio kaj la strukturoj de la sekretaj servoj, armeo kaj polico, kiuj laŭ Javlinskij ne defendas la popolon, sed la aktualan potencon. La unua kondiĉo por ekonomie sukcesi kaj pluekzisti ne estas havi kaj produkti taŭgajn varojn por la merkato, sed disponi pri patrono, kiu havas altan funkcion en la ŝtata hierarkio. La merkata konkurenco estis ruinigita kaj la sendependaj memstaraj entreprenistoj, kiuj estas ĉikanataj de la ŝtata burokratio per rigore aplikataj leĝoj, altaj impostoj kaj arbitraj kontroloj, devas timi persekutadon fare de la justico. La nuntempaj industriaj oligarkoj, kiuj perdis sian liberecon, komplete dependas de la ŝtataj burokratoj, kiuj kontrolas la tutan ekonomion de la lando kaj 70 procentojn de la industrio, kiu estas en la manoj de la ŝtato, dum nur ĉ. 25% de la popolekonomio konsistas el privataj entreprenoj. La iama sendependa konkurenco de la tipo Gusinskij, Berezovskij aŭ Ĥodorkovskij, kiu aŭdacis enmiksiĝi ankaŭ politike, estis likvidita aŭ elŝaltita de Putin. Dum la subfosataj kaj manipolataj strukturoj de la demokratio (cetere ankaŭ la konstitucio mem) servas kiel formala fasado, ĉar demokratio, civilsocia libereco kaj partia plurismo estas konsiderataj kiel danĝera balasto, kiu nur ĝenas la laboron de la regantoj de Ruslando, pli gravas senperaj kontaktaj inform-kanaloj inter ŝtataj funkciuloj kaj ekonomiaj ĉefroluloj, kiuj ekzistas inter la diversaj gvidaj individuoj kaj grupoj; ili estas altgrade maltransparentaj, plej ofte (duon)privataj kaj sekretaj, tiel ke la publiko ekscias nenion pri la diskutoj, interkonsentoj kaj decidoj okazintaj malantaŭ la kulisoj, kvankam ili esence koncernas ŝtatajn interesojn.

Kompare kun la registaro, gvidata de la ĉefministro (nuntempe Medvedev), kies kompetencoj limiĝas precipe al plenuma, kontrola kaj raporta funkcioj, fortan pozicion okupas en Ruslando la prezidenta administracio, al kiu apartenas la ĉefrepresentantoj de la rusia prezidento en la 8 grandaj federaciaj regionoj de Ruslando, kies tasko estas kontroli la efektivigon de la konstituciaj principoj en tiuj regionoj. Tiuj reprezentantoj estas federaciaj ŝtatofunkciistoj kaj estas rekte nomitaj de la prezidento, kiu atendas de ili, kie ili plenumas lian politikon. Kadre de tiuj federaciaj regionoj ekzistas la „subjektoj“ de la Ruslanda Federacio, kiuj konsistas laŭhierarkie el 22 respublikoj, 1 aŭtonoma provinco, 4 aŭtonomaj distriktoj, 9 regionoj, 46 provincoj (oblasti) kaj 3 urboj kun subjekta statuso kaj estas gvidataj de prezidanto aŭ guberniestro. Per tiu vertikala strukturo la Kremlo tenas la tutan landon sub sia rigora kontrolo.

La rolo de la parlamento (Dumao), en kiu la t.n. Kremlo- aŭ Putin-partio „Unueca Ruslando“³³ kiun Boris Nemcov nomis „partio de banditoj kaj ŝtelistoj“, havas la grandan plimulton de la mandatoj, limiĝas al aprobo de leĝaj proponoj el la Kremlo, kiuj en principo estas ankaŭ rifuzeblaj per du trionoj

³¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Corruption_Perceptions_Index.

³² En marto 2017 *Novaja gazeta* publikigis la materialon de esploro, komencita en 2014, pri la kontraŭleĝa eksportado de 700 miliardoj da rubloj el Ruslando, de kiuj 350 miliardoj fluis tra iuj bankoj, kies membro de la konsilio de direktoroj estis Igor Aleksandroviĉ Putin, kuzo de V.V. Putin (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Igor_Putin).

³³ Kvankam kiel prezidenta kandidato Putin eksciĝis el tiu ĉi partio, ne estas sekreto, ke li funkcias kiel ĝia kaŝita gvidanto.

de la voĉoj. Ĝenerale, la Dumao fidele konfirmas ĉiujn proponojn, kiuj venas de la Kremlo, por eviti konfliktojn kun ĝi. Kelkaj el tiuj novaj leĝoj, kiuj limigas la rajtojn de la civitanoj, vekis internacian atenton. Nature, en tiu parlamento ne okazas diskutoj kiel la Okcidento deziras, ke ili okazu, pro kio en Okcidento la Dumao estas konsiderata kiel pseŭdo-parlamento. La „opozicio“ en tiu parlamento principe subtenas la Kremlo en ĉiuj gravaj strategiaj demandoj de la interna kaj ekstera politiko, kvankam la diversaj partioj havas siajn proprajn politikajn ideojn kaj programojn, kiujn ili provas puŝi. Dum ekzemple la „liberal-demokratia“ partio de la skandalema „politika klaŭno“ Ĵirinovskij, kiu esence estas ultranaciisma, dekstre populisma, ksenofobia ĝis ekstremdekstra organizaĵo kun imperiismaj revoj, inter multaj aliaj radikalaj proponoj volas „pendigi krimulojn sur publikaj placoj“ (kompreneble ne temas pri tiuj de la Putin-kasto), la eksmodaj komunistoj, kiuj reprezentas precipe maljunulojn, milit-veteranojn kaj homojn, kiuj nostalgias pri marksismaj, komunismaj kaj maldekstraj ideoj kaj ne estas adeptoj de Putin, celas „renovigi la socialismon“ por helpi al malriĉuloj. La kvara, plej malgranda partio, kiu estas nuntempe reprezentata en la Dumao, nomiĝas „Justa Rusio“.³⁴ Ĉi tiu partio mem konsideras sin socialdemokratia, konfesante la ideojn de la demokratia socialismo aŭ sociala liberalismo kaj membras en la Socialisma Internacio, kvankam oni ne povas kompari ĝin kun klasikaj socialdemokratiaj partioj en Okcidento. Rilate al la Kremlo ĝi gvidis zigzagan kurson kaj havis en kelkaj regionoj ioman sukceson, sed intertempe ĝi praktike perdis sian iaman signifon kaj la duonon de la membroj, de kiuj restis aktuale 414 500. Ilia gvidanto (Sergej Mironov) eĉ ne plu kandidatiĝis por la prezidenteco en 2018, ĉar lia partio oficiale apogis kandidaton Putin kaj tiel kondukis sin mem al la absurdo. La enkonduko de novaj politikaj partioj ne estas dezirata de la Putin-reĝimo, pro kio ilia registrado estas ligita kun multaj obstakloj. En la politika sistemo de Ruslando, la legislativo, judikativo kaj ekzekutivo evidente ne estas organoj sendependaj de la gvidaj ŝtataj organizoj, sed funkcias kiel reciprokaj helpantoj aŭ komplicoj en kazo de bezono, kiel montris pluraj ekzemploj. La armeon kaj eklezion, kiuj ŝajnas formi unuecon kun la ŝtataj organizoj, Putin nomus „naturaj partneroj“. La akaparado (iuj parolas pri ŝtelado) de la landaj resursoj fare de ekskomunistoj, novaj kapitalistoj, oligarkoj kaj kleptokratoj devus esti esplorataj de sendependaj politikaj komisionoj kaj de la justico mem, kiel en normala ĵura ŝtato. Finfine, juristo Putin vidas sin mem kiel „defendanton de la juro“, kiun lia ŝtato evidente difinas mem laŭ konkreta kazo. Sed en ŝtato, en kies politika kulturo la jura nihilismo estas ĝenerala integra parto de la sistemo, ekzistas ankaŭ granda abismo inter juro kaj justeco, kiu estas arbitre difinita laŭ propra bontrovo de la decidantaj regantoj, potenculoj kaj oficistoj.

„Diktaturo kun granda apogo de la loĝantaro“

En sia tre leginda libro pri la putinismo la konata usona historiisto kaj publicisto Walter Laqueur trafe nomis Ruslandon „Diktaturo kun granda apogo de la loĝantaro“. Tamen, oni devas scii, ke en Ruslando la subteno de la centra potenco fare de la popolo estas grandparte pasiva kaj baziĝas sur nerezistado, por tiel diri. Tio signifas, ke la senopinia kaj nepolitika ‘amorfa’ homamaso do ne aktive kontraŭstaras la diktaturon, sed, male, akceptas ĝin kvazaŭ kiel ion necesan kaj neeviteblan kaj kunludas kun ĝi, ĉar oni ne vidas alternativon, kiu eble tamen ekzistus. Kion tiu ‘pasiva nerezistado’ signifas oni ĵus vidis okaze de la reelektado de Putin, kiu evidente respegulis ankaŭ la malemon de la rusa popolo ŝanĝi la politikon. Putin garantias „stabilecon“, kaj stabileco signifas en lia politika koncepto ŝanĝi nenion. Multaj rusoj timas ŝanĝojn kaj reformojn, ĉar kun ili estis faritaj malbonaj spertoj. Prefere do nenion ŝanĝi por eviti malboniĝon de la stato. Depende de la konduto de la rusoj, Putin povus enkonduki eĉ pli drastajn metodojn en la interna politiko, sed ŝajnas, ke tio ne tro ĝenas la rusojn. Tamen, la homoj en Ruslando havas treege diversajn opiniojn. Kvankam la popolo de Ruslando ne estas tute ĝoja pri la situacio en sia lando, ĝi tamen ŝajnas esti kontenta, kaj ĝi fidis al Putin, kvankam tiu ĉi politikisto en la plimulto de la landoj de la mondo havas negativan pritakson. Kurioza sinteno, kiu en Okcidento ne estas tute komprenata. Tamen, oni ne subtaksu la decidemon kaj agemon de la ruslandanoj, kiuj tradicie profunde malfidas la politikan potencon. Tio ne signifas, ke ili subtenas la dezirojn de la Okcidento, pri kiu ili ĝenerale ne tro interesiĝas, kion ĝi pensas pri Ruslando, kaj pri kiu la granda parto de rusoj praktike scias malmulton krom kliŝoj, stereotipoj kaj antaŭjuĝoj. Malgraŭ senlimaj pasiveco, indiferenteco kaj pacienco, kiuj karakterizas la mentalecon de la rusa popolo, kiu laŭ Igor Jurgens, direktoro de INSOR,³⁵

³⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Parlamentwahl_in_Russland_2016.

³⁵ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Игорь_Юрьевич_Юргенс, „Instituto de la moderna evoluo“ (vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/INSOR>).

estas arkaika, oni ne povas ekskludi novajn protestojn, se la homoj en Ruslando sentas sin trompitaj de la regantoj kaj havas la impreson, ke ili servas nur kiel idiotoj por apogi diskredititan politikan reĝimon por helpi al malgranda kasto fariĝi pli kaj pli bonfarta kaj riĉa. Rusoj povas ankaŭ koleri kaj eksplodi. Ĝuste la rusa sociologo Igor Eidmann opinias, ke la civitanoj de Ruslando iam perdos la timon ankaŭ antaŭ la putinisma monstro, kiel ili perdis ĝin antaŭ la carisma kaj komunisma diktaturo. Pro tio tiu reĝimo, precipe ĝiaj diversaj policaj aparatoj kaj sekretaj servoj, kies timo de la popolo ne estu subtaksata, nerveze observas la situacion en la lando kaj se necese brutale sufokas ĉiuspecan protestemon en ĝia ĝermo. En la lando de Putin disvastiĝis la kulturo de la timo, kiel observas la fama germana verkistino Herta Müller, kiu ankoraŭ spertis la rumanan Ceaușescu-diktaturon. La konata rusa politologo Gleb Pavlovskij³⁶ priskribis la putinisman Ruslandon kiel sistemon „de la lojaleco de la timo“, kiu funkcias tiel longe, kiel la putinaj funkciuloj respektas ĝin. Eble pro tio la prognozita nova rusa revolucio cent jarojn post la jaro 1917 dume ne okazis. Putin okulfrape evitis omaĝi tiun historian „jubileon“ kaj delegis la aferon al Sergej Naryŝkin, kiu kunordigis la ĉefajn eventojn ĉirkaŭ tiu „jubileo“ kaj lasis la diskuton al la publikrilata historiisto episkopo Tiĥon, kiu klarigis al la homoj, kio okazis en 1917.

Kolero kaj protestoj povus esti generitaj de aliaj flankoj en la ruslanda socio: ekzemple de maljunaj homoj, kiuj rifuzas altigon de la pensiula aĝlimo, aŭ de homoj, kiuj devas konsumi malalt-kvalitajn nutraĵojn aŭ vivi en malpura naturo. La populareco de Putin kaj konsorcianoj dependos de tiaj ekzistaj demandoj, kaj se ili ne povos solvi tiujn problemojn, ĝi nepre falos, kun fatalaj sekvoj.³⁷

Ĉu io ŝanĝiĝus sen Putin?

Gudkov konkludas, ke eĉ se Putin retiriĝus kaj malaperus de la scenejo, malmulto ŝanĝiĝus en Ruslando, ĉar la sama politika-ekonomia sistemo – oni povus ankaŭ diri politika kulturo – principe restus, kaj plu funkcius. Tio estas pli esenca ol la potenco de unuopa persono, kiu estas elŝanĝebla. Gudkov ne pretas kulpigi nur la personon de Putin mem, ĉar estas la „korto, kiu faras, ke la reĝo dancas“. Estas iluzie kredi, ke „caro“ Putin persone decidas ĉiujn aferojn mem. Precipe la grupoj de la sekretservistoj, kiuj formas ĉefan pilieron de la reĝimo kaj al kiuj Putin fidas, estas interesataj pri la stabileco de la Putin-ŝtato, pri la konstanta mobilizado de la civitanoj en ĝia senco kaj pri diversaj provokoj en la ekstera politiko. Ankaŭ la ukraina politologo Anton Ŝeĥovcov klarigis en intervjuo kun Tamedia (Svislando), ke en Ruslando ne plu ekzistas unusola centro, kiu ĉion decidas. La rilatoj estas flegataj de diversaj potenc-centroj sur diversaj niveloj kaj ebenaĵoj, kaj tiuj centroj konkuras kaj rivalas inter si je influo kaj je la aliro al resursoj. En tia tributa sistemo ĉiuj volas montri al la reganto en la Kremlo, ke ili estas utilaj, pro kio aperis kulturo de ampleksa flatado, hipokritado kaj reciproka favorado. Gravus respekti kaj apogi la ‘ĝeneralan linion’ de la politiko de Putin. Se ili respektas la validajn regulojn de la ‘sistemo’, la unuopaj aktoroj ricevas certajn liberecojn. Pri Moskvo okupiĝas Sobjanin, pri Ĉeĉenio Kadyrov kaj pri la jura ĉikanado de Navalnyj zorgis precipe la justicgeneralo Aleksandr Bastrykin, ĉefo de la Esplorkomitato de la Rusa Federacio, kiel kelkaj observantoj supozas. Navalnyj suspektis ĉi-generalon pro grandstila imposta korupto en eksterlando. Sekve, Navalnyj ekhavis gravajn problemojn kun li, ĉar li reagis kiel lia malamiko. Tamen, Putin faras la ĉefan politikon en la lando, kio signifas, ke li devus akcepti la veran respondecon, se iam li estus konfrontita kun seriozaj riproĉoj kaj akuzoj. Al la negativaj trajtoj de Putin apartenas lia kutimo rifuzi ĉiun personan respondecon aŭ kompetencon, se oni levas kritikan demandon pri konkreta problemo, kiu koncernas ankaŭ lin mem, kvankam li pretendas esti la ĉefa reganto de la lando, kiu diktas la tonon.

Precipe la pli kaj pli malfavora interna ekonomia situacio metas limon al multaj planoj kaj projektoj de Putin, kaj la okcidentaj sankcioj almenaŭ iom damaĝis la agan bazon de difinitaj protagonistoj de la Putin-sistemo, pro kio en Ruslando oni ja ankaŭ lamentas, kvankam la rusoj klopodas bagateligi la sekvojn. Sed la sankcioj, kiujn sentas precipe malgrandaj entreprenistoj, kiuj ne povas ricevi kreditojn, ne ĉiam trafas la ĝustajn homojn, kaj ili ankaŭ ne malhelpas realigi novajn gigantajn projektojn (kiel la gasfabrikon Yamal LNG de Novatek, kiu apartenas al la oligarko Leonid Mihelson, aŭ la Krimean Ponton, kiun konstruis la firmao „Strojgazmontaĵ“ de Arkadij Rotenberg, amiko de

³⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Gleb_Olegowitsch_Pawlowski.

³⁷ Vd. <https://www.nzz.ch/international/putins-beliebtheit-zeigt-wo-russlands-echte-probleme-liegen-ld.1400548>, https://wciom.ru/news/ratings/doverie_politikam.

Putin). Al la sama kategorio de tiaj grandprojektoj apartenas la Vintraj Olimpikaj Ludoj en Soĉi de 2014³⁸ kaj la Monda Futbalturniro en Ruslando de 2018 kun 12 gigantaj novaj stadionoj en 11 urboj,³⁹ kiuj probable voris multe pli ol dek miliardoj (dolaroj!) da kostoj. Ŝajnas, ke la plimulto de la kostoj estis pagita de la ŝtata kaso. La Kremlo publikigis la oficialan ciferon de 11,8 miliardoj da dolaroj, ĉefe por komuniki, ke la ludoj en Ruslando kostis 2 miliardojn pli ol tiuj en Brazilo kaj do estas la plej multekostaj en la ĝisnuna historio de tiu turniro. Sed la realaj elspezoj estis verŝajne multe pli altaj, inkluzive grandskalan korupton. Laŭ la raporto 2018 de la Sekreta Servo de Estonio la evento kostas ses foje pli ol planite, kaj la gazeto *RBK* skribis, ke temas pri 122 miliardoj. Per tiu multekosta giganteco Putin celas demonstri al la mondo antaŭ ĉio, ke Ruslando kapablas fari la samon kiel la Okcidento. Sed vide al la drasta malriĉeco en la lando, tiuj elspezoj por multekostaj stadionoj, kiuj poste verŝajne apenaŭ plu ofte estos utiligataj, estas skandalo. Ĉiukaze la turniro estas unika okazo por propagando kaj por gajni multe da mono. La financan profiton eltiros ĉefe malnovaj konataj oligarkoj kiel Gennadij Timĉenko, Aras Agalarov, Oleg Deripaska, Viktor Vekselberg, Arkadij Rotenberg, Aleksej Miller, Aliŝer Usmanov, Mihail Fridman k.a., kiuj partoprenis aŭ la konstruadon de la stadionoj aŭ de ilia ĉirkaŭa infrastrukturo, ekzemple stratoj, flughavenoj kaj hoteloj, aŭ ili funkciis kiel sponsoroj de la sporto en Ruslando.⁴⁰ La rusa satiristo Viktor Ŝenderoviĉ kritikis la futbalan turniron en Ruslando kiel propagandon de la Kremlo kaj de Putin kaj komparas ĝin kun la Olimpikaj Ludoj de 1936 en Germanio, kie la sporto estis misuzata por politika propagando. La kritika intelekto timas, ke post la fino de la turniro sekvos la venonta ondo de reprezalioj kontraŭ la opozicio.⁴¹

Malgraŭ la relative malalta prezo de la nafto, de kiu la ekonomio de Ruslando preskaŭ centprocente dependas, la financoj de Ruslando estas sufiĉe stabilaj, precipe en la ekstera komerco, dum en la interna popolekonomio ekzistas malekvilibro. En aprilo 2018 la tuta valoro de la internaciaj rezervoj de la rusia ŝtato estis 459,9 miliardoj de usonaj dolaroj, de kiuj 378,7 koncernas la devizajn rezervojn kaj 81,15 la orajn rezervojn.⁴² La eksterlandaj ŝtataj ŝuldoj de Ruslando tamen kreskis en la unua kvarono de 2018 je 1,2 procentoj aŭ 6,052 miliardoj al 524,924 miliardoj da dolaroj.⁴³ La inflacio kaj la senlaboreco estas malgrandaj (malgraŭ malaltaj salajroj kaj dubindaj dungokondiĉoj), sed la timo pri nova stagnado aŭ eĉ kolapso de la ekonomio, kiu en Ruslando estas nura drako el papero, tamen ekzistas. La fortiĝo de la rublo kaj la malpliigo de la preza premo permesis al la Centra Banko malaltigi la interezojn pli forte ol atendite por helpi la akcelon de la popolekonomio, kiu troviĝis en recesio.⁴⁴ Ĉi-foje ĝi povus havi fatalajn sekvojn. Post negativaj ciferoj dum la recesio de 2015-16 en 2017 la ekonomio, t.e. la malneta enlanda produkto de Ruslando kreskis nur 1,55 procentojn kaj por 2018 la situacio verŝajne ne pliboniĝos esence.⁴⁵ Kvankam kelkaj procentoj de la popolo materie profitis de la nova epoko kaj vivas eĉ pli bone ol averaĝa homo en Okcidento, la ruslanda popolo restis malriĉa, la vilaĝoj disfalas kaj dezertiĝas kaj la tiea vivo elmortas, amaso da rusoj elmigris. La nombro de malriĉuloj kreskas. Nu, Putin ŝajnas konscii pri tiu problemo, se li diris en sia „parolado al la nacio“ de la 1a de marto 2018, du semajnojn antaŭ la elekto, ke rilate la nivelon de la vivado en Ruslando la celoj ankoraŭ ne estas atingitaj. En tiu parolado li ankaŭ menciis, ke en 2017 la nombro de laborkapablaj homoj reduktiĝis je unu miliono. Malgraŭ giganta ekonomia potencialo, la malneta enlanda produkto de Ruslando estas, laŭ la kalkulo de la Internacia Monfonduso, 13-foje pli malgranda ol tiu de Usono, 11,6-foje pli malgranda ol tiu de Eŭropa Unio, 8-foje pli malgranda ol tiu de Ĉinio, 3,3-foje pli malgranda ol tiu de Japanio, 2,5-foje pli malgranda ol tiu de Germanio, 1,75-foje pli malgranda ol tiu de Britio kaj

³⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Olympische_Winterspiele_2014.

³⁹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Fußball-Weltmeisterschaft_2018.

⁴⁰ Vd. *Die Republik* (Svislando) de la 11a de junio 2018.

⁴¹ Vd. <https://www.srf.ch/sendungen/echo-der-zeit/postauto-ffaere-das-ausmass-ist-gross>.

⁴² Vd. <https://de.statista.com/statistik/daten/studie/487403/umfrage/gold-und-devisenreserven-von-russland>. En aprilo 2008 la internaciaj rezervoj ankoraŭ estis 532,47 miliardoj (devizoj: 519,76 mrd., oro: 12,72 mrd.) kaj falis en aprilo 2015 sur la nivelon de 356,01 miliardoj da dolaroj (devizoj: 307,72 mrd., oro: 48,29 mrd.). Kvankam poste la rezervoj rekreskis, ili neniam plu atingis la nivelon de aprilo 2008. Internacian komparon de la devizaj rezervoj vd. sub <https://de.statista.com/statistik/daten/studie/157870/umfrage/waehrungsreserven-ausgewaehlter-laender>.

⁴³ Vd. <https://de.sputniknews.com/wirtschaft/20180419320404211-russland-schulden>. Pri la ŝuldoj de Ruslando vd. ankaŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Staatsschuldenquote_in_Russland kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_Länder_nach_Staatsschuldenquote.

⁴⁴ Vd. <http://www.handelsblatt.com/finanzen/banken-versicherungen/starker-rubel-russische-zentralbank-senkt-zinsen-staerker-als-erwartet/20718552.html?ticket=ST-1515330-LnkVcs1Le5Q2Kqdsf64O-ap1>.

⁴⁵ La evoluon de la malneta enlanda produkto en Ruslando vd.

<https://de.statista.com/statistik/daten/studie/14568/umfrage/wachstum-des-bruttoinlandsprodukts-in-russland>.

ankaŭ pli malgranda ol tiu de Hindio, Italio aŭ Sudkoreio. Laŭ la kalkuloj de la Monda Banko kaj Unuiĝintaj Nacioj (2016) la ĉi-rilata cifero estas komparebla kun tiu de Hispanio.⁴⁶ Do, laŭ la enlanda ekonomia potenco, Ruslando havas nur la 12an rangon internacie, kvankam la ŝanĝo estas +14,51% kompare kun la antaŭa jaro. Krom pri la ekspluatado de resursoj kaj la vendado de nafto kaj gaso la „komercisto“ Putin povas fanfaroni praktike nur per la eksportado de militaj varoj, por konservi sian kredindecon. Sed kiu serioza armeo krom ekzemple tiu de Sirio volas aŭ povas fidi al la rusa armila teknologio? La tuta palavrado de Putin pri la supereco de Ruslando baziĝas sur giganta blufado por impresi, timigi kaj konfuzi la kontraŭulojn kaj trankviligi aŭ kontentigi la propran popolon, kiu devas reelekti lin. Kaj se Ĵirinovskij sovaĝe kriadas en la rusa televido, ke „Ruslando estas grandega“ kaj „Eŭropo estas malgranda“, pro kio Ruslando bezonas fortan armeon, li probable ne sufiĉe konscias pri la realaj ekonomiaj faktoj kaj nur ridindigas sin mem. La tuta (malplena) ideologio de la „rusa mondo“ de Putin kaj aliaj devas esti konsiderata kiel preteksto por pravigi la propran politikon, kiel varma aero, kiu povos rapide elvaporigi kune kun la ordonita patriotismo, kiu, cetere, laŭ malnovaj sociologiaj enketoj, pli frue ne troviĝis inter la prioritataj valoroj de la rusoj. Putin, kiu estas klasika demagogo, kiu probable malmulte interesiĝas pri la progresoj de sia popolo, kiun li malalte taksas kiel senesperan kazon, havas neniujn seriozajn politikajn kaj sociajn viziojn por evoluigi tiujn supre menciitajn dezertajn regionojn, kvankam li plej kalkulas ĝuste pri la loĝantaro en tiuj lokoj, kiu trovas Putin bona kaj pretas reelekti lin. La iama ĉefministro de Ruslando Miĥail Kasjanov (2000-4), kiu intertempe fariĝis opoziciulo, scias pri kio li parolas; en marto 2012 li donis en aŭstra gazeto jenan pritakson pri Putin: „Krom sia vulgara primitiva retoriko Putin havas nenion utilan por proponi al la rusoj. Li havas nenion senton por la damaĝo, kiun lia malbona regado alportos al Ruslando en estonteco. La [tiam] tria prezidenco de Putin ne estos gvidata de racio kaj modero, sed karakterizata de la instinkto kaj potencavidado.“ Li estis plene prava. Fakte, Putin ĉiam estis aroganta tipo.⁴⁷

Do, Ruslando estas plena de paradoksoj kaj kontraŭdiroj. Estos interese observi, kio okazos kun Ruslando en la venontaj jaroj. Nu, la usonanoj jam scias ĝin: Laŭ la analiza kompanio „Stratfor“, la nova „malvarma milito“ inter Ruslando kaj la Okcidento plu daŭros, Usono akriĝos siajn sankciojn kontraŭ Moskvo (kion ĝi efektive faris la 15an de marto), la ekonomia situacio de Ruslando malboniĝos kaj la lando pli dependos de Ĉinio, kiu jam sukcese distancigis ĝin de Eŭropo. Malgraŭ la malklaraj simpatioj de Trump, kiun li montras al Putin, ŝajnas, ke la usonanoj ne plu volas perdi sian tempon kun tiu malfacila, malagrabra „partnero“, kiu tamen restos danĝera militrivalo, kion konfirmas ankaŭ Jens Stoltenberg, ĉefo de NATO. Por renkonti tiujn defiojn Putin devos iel reagi kaj agi, se li ne volas resti rigida sur siaj pozicioj. Oni povas nur esperi, ke la rusaj atombomboj, per kiuj Putin jam minacis la mondon en 2014 dum la krimea krizo, ludos nenion rolon. Dume, Eŭropo kaj la cetera mondo restos dependa de nafto kaj gaso el Ruslando.

Ĉu ekzistas risko de la sistemkolapso ?

Karakterize por reĝimoj, kiuj baziĝas sur mensogado, ĉantaĝado, minacado, falsa ludado, koruptado, sur milito kaj polica teroro, estas ankaŭ, ke ili povas kolapsi aŭ krevi en ajna momento, se ilia gvidanto demisias aŭ forpasas, kaj se la elito konsideras tian reĝimon ne plu oportuna aŭ celkonforma. Tio okazis kun la elitoj de la komunismaj ŝtatoj en 1989-91. Tio povos okazi ankaŭ kun la Putin-reĝimo, kiu manovris sin kaj la landon sub la formaĝokloŝon, en la malfacile reelireblan internacian izolitecon. Do, la putinisma sistemo povus implodi de interne, kvankam ŝajnas, ke ĝi estas stabila kaj disponas pri sufiĉa kapacito por eviti tian scenaron. En Ruslando ekzistas tradicio de longaj regadoj (Stalin, Breĵnev), sed ankaŭ de puĉoj (Ĥruŝĉov, Gorbaĉov) kaj subitaj krizoj pro malsaniĝo de la gvidanto (Ĉernenko, Andropov, Jelcyn), kiu devas esti urĝe anstataŭita. Multo do dependas de la elitoj, kiuj subite povos ŝanĝi sian opinion, se ili konstatos, ke la sistemo elĉerpiĝis. Ankaŭ en 1917/18 kaj 1991 elitoj ŝanĝis la reĝimon, tamen kun certa subteno de vastaj popoltavoloj, ĉe kiuj la malnova reĝimo diskreditiĝis (carismo kaj komunismo). Ĉar multaj anoj de tiuj elitoj probable sekvas ĉefe siajn proprajn privatajn interesojn (kariero kaj mono), ili povos aŭ rezigni pri Putin kiel gvidanto, aŭ daŭrigi lian sistemon, por

⁴⁶ Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_\(nominal\)](https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_(nominal)). Laŭ la malneta enlanda produkto laŭ unuopulo (per capita), kiu respogas la vivnivelon de iu lando (sed ne la laŭpersonan enspezon), Ruslanda okupas la 64an rangon laŭ la kalkulo de la Internacia Monfonduso (2017), la 61an rangon laŭ la Monda Banko (2018) kaj la 70an rangon laŭ Unuiĝintaj Nacioj (2016) (vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_\(nominal\)_per_capita](https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_(nominal)_per_capita)).

⁴⁷ Vd. ekzemple intervjuon el la jaro 2000 sub <https://www.youtube.com/watch?v=3F73YRjp5GU>.

savi sian haŭton, tiel longe kiel tio ŝajnas oportuna al ili. Ankaŭ nova „milito“ inter la rivalantaj regantaj grupoj povus konduki la sistemon al la fino. La ĝenerala evoluo iras hodiaŭ pli rapide ol antaŭ 50, 100 jaroj. Sed neniu povas scii, kio okazos, ĉar la lando kaj la socio estas fermitaj, maltransparentaj, silentemaj, kontrolataj de la Kremlo kaj de la sekreta(j) servo(j), kiel dum la carisma kaj sovietia tempoj. Sendube, multaj gravaj decidoj, ĝeneralaj kaj konkretaj, dependas de la persona opinio de Putin mem, kiu klopodas stiri la ŝipon kaj devas funkcii kiel gluo por kunteni la diversajn aliancojn kaj individuojn, por ke la sistemo ne disfalu centrifuge. La reto kaj per tio la influo de Putin estas ege granda kaj vasta, ampleksante ĉiujn teritoriojn de iama Sovetunio, kie li havas multajn agentojn, simpatiantojn kaj ambasadorojn, kies danĝereco kaj grava rolo en kazo de ŝtatrenverso ne estu subtaksata. Putin, kiu ne plu dependas de koruptaj oligarkoj, ne volas fariĝi ostaĝo de tiuj grupoj (kiujn li eble eĉ ne plu plene kontrolas), pro kio li ludas kun ili laŭ fia maniero. La ĉefa oligarko de Ruslando estas Putin mem. Iuj ekspertoj kredas, ke li estas, kun ĝis 200 miliardoj da privata havaĵo, la plej riĉa homo de la tero. Aliflanke, la plebo, kiu estas malriĉa kaj senpova, postulas socialan ŝtaton, kiu protektas ĝin, sed ĝi ne volas cinikan demagogian kaj aŭtokratiisman regadon aŭ (duon)kriman reĝimon; la ruslandanoj volas vivi en paco kaj havi bonajn rilatojn kun la najbaroj kaj la resto de la mondo, inkluzive Ukrainion, Eŭropon kaj Usonon. Ĉiujn tiujn garantiojn Putin, kiu patologie elpaŝas kun ĉiam novaj provokoj, minacoj kaj agresoj por pruvi sian superecon, ruzecon kaj taŭgecon, apenaŭ povas doni. En Ruslando ekzistas ne malmultaj opoziciuloj kaj kritikistoj, sed ili ne estas sufiĉe fortaj kaj unuigitaj por renversi la Putin-reĝimon. Ĉu kun ili la demokratio revenus al Ruslando, estas tamen tute alia demando. En Ruslando ne ekzistas politikaj partioj kun demokratiaj tradicioj, kiuj formas la politikon. Kiel ajn, Ruslando sen Putin plej verŝajne ne plu estus la sama Ruslando. Sed en Okcidento oni revas vane pri iu Ruslando, kiu aspektu kaj kondutu laŭ ĝiaj imagoj kaj deziroj. Kaj multaj homoj en Okcidento timas, ke post Putin Ruslando povus fariĝi eĉ pli malbona. Ronald Reagan nomis Sovetunion „imperio de la malbono“, George W. Bush parolis pri la „akso de la malbono“ kaj pri „kanajlaj ŝtatoj“. Ĉi tiu statuso estis rezervita al Irano, Sirio, Libio, Irako, Afganio, Nordkoreio kaj Kubo, kiuj aŭ apogas terorismon kontraŭ Usono kaj la Okcidento, aŭ strebas posedi kaj apliki amasdetruajn armilojn.⁴⁸ Rimarkinde estas, ke ĉiuj tiuj ŝtatoj havas bonajn rilatojn kun Ruslando. La usonanoj, kiuj mem apogas „kanajlajn“ ŝtatojn, kiuj financas la internacian terorismon, gvidas militojn kontraŭ najbaroj kaj subpremas la homajn rajtojn (kiel Saŭdarabion), ne kuraĝis meti Ruslandon sur tian nigran liston ĝis nun, kvankam ili riproĉas al la rusoj, ke ili malrespektas la konvenciojn pri armada kontrolado kaj subpremas la homajn rajtojn. Nature, la rusoj riproĉas al la usonanoj la samon, kaj eĉ pli, plendas, ke ĉi-lastaj ne bonvolis konsenti pri kompromisaj proponoj el Moskvo. Ĉar Ruslando neniam kulpas, el la vidpunkto de Putin la usonanoj mem kulpas pri la mizeraj reciprokaj rilatoj, kiuj atingis novan neatenditan krizon kun Trump.

Aliflanke, Putin admirindas, ĉar li ne perdis la kuraĝon kaj daŭre volas „servi“ al la patrujo kiel ĝia prezidento. La veraj motivoj por tiu motivacio estas malklaraj kaj ankoraŭ pli profunde esplorendaj. Liaj multnombraj paroladoj en plej diversaj okazoj estas nur parto de la impresa bilanco de ege aktiva, nelacigebla ŝtatestro.⁴⁹ El la vidpunkto de multaj rusoj la politiko de Putin eble estas ĝusta, prava kaj bona por Ruslando, kvazaŭ granda feliĉo, kvankam li troigas siajn metodojn, kiuj montras paranojn kaj skizofrenion samtempe. Eidman timas, ke Putin, kiu respektas neniujn decidojn aŭ regulojn de internaciaj instancoj kaj organizaĵoj, aŭ kondukos sian landon en la kompletan izoliĝon aŭ provokos universalan militon kun alia grandpotenco, ekzemple Usono, ĉar la marĝenaj lokaj militetoj en Ukrainio kaj Sirio (kun miloj da viktimoj) ne plu sufiĉas por kontentigi la propran agreseman potencialon kaj la propagandan efikon, por deflankigi la popolon de Ruslando de internaj problemoj. Tamen, oni povas dubi, ke Putin vere riskas aŭ deziras tian militon, ĉar certe ĝi estus unu numero tro granda por li kaj li povus nur perdi ĝin, malgraŭ posedo de propraj nukleaj armiloj. Se laŭ alia scenaro la premo (de interne kaj ekstere) iĝos tro granda, opcio por Putin povus esti cedo, rezigno, demisio, retiriĝo, transdono de la povo al alia – la nomaro de eventualaj posteuloj estos prezentita ĉi-sekve. Sed unue kelkaj vortoj pri novaj rusaj armiloj, kiujn Putin prezentis antaŭ nelonge al la monda publiko.

⁴⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Evil_empire kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Rogue_state.

⁴⁹ Vd. <http://kremlin.ru/events/president/news>, kaj <http://www.osteuroopa.ch/putin-reden.htm>.

Putin salutas la homaron per novaj nukleaj armiloj

La ciniko de Putin, kiu senĉese provokas la homaron, tretante la regulojn de la valida internacia ordo per piedoj, atingis novan kulminon, kiam la 1an de marto 2018, do 17 tagojn antaŭ la elekto, li anoncis en sia memorinda „parolado al la nacio“ novajn reformojn, dirante: „Por iri antaŭen kaj disvolviĝi dinamike, ni devas larĝigi la spacon de la liberecoj en ĉiuj sferoj, fortigi la instituciojn de la demokratio kaj loka aŭtonomeco, la strukturojn de la civitana socio kaj de la tribunaloj, esti lando, kiu malfermas sin al la mondo, al novaj ideoj kaj iniciatoj. (...) Se ni ne faros tion, ni ne havos estontecon, nek niaj infanoj nek nia lando.“ Ĉi tiuj frazoj, kiuj iel rememorigis lian manifeston de decembro 1999, rekte kontrastas kun la realeco, kiu esence limigis la civitanajn rajtojn kaj kondukis la demokration en Ruslando en la sakstraton, al la absurdo. Ĉu Putin do vere estas „pura demokratio“⁵⁰ kaj liberalisto aŭ ĉu li nur celas trompi la publikon? La fakto estas, ke la „demokratiaj“ elektoj ne kaŭzis pli senteban liberaliĝon de la reĝimo en Ruslando. Putin havis 18 jarojn da tempo por efektiviĝi tiajn plibonigojn, same por forigi la drastan malriĉecon kaj mizeron en vastaj regionoj de la lando. Nu, la bonaj jaroj, kiam la prezo por la nafto estis alta kaj Ruslando povis financi la importojn, pasis. La homoj en Ruslando, kiuj ege suferis dum la financa krizo de la jaro 2008 kaj dum la recesio de la jaroj 2015-16, nun vidas sin konfrontitaj kun pli altaj prezoj por bazaj nutraĵoj kaŭze de la sankcioj kaj bojkotoj,⁵¹ kiujn Putin proklamis kontraŭ okcidentaj varoj kaj liverantoj. Tio estas komplete neracia kaj cinika decido, kiu trafas precipe la malriĉajn homojn en Ruslando. De 144 milionoj da loĝantoj Ruslando havas 20 milionojn da malriĉuloj.⁵² La ekzista minimumo estas ĉirkaŭ 145 eŭroj, la averaĝa monata salajro estas 520, en Moskvo 845 eŭroj.⁵³ Rilate la sekurecon, Rusio apartenas al la plej danĝeraj landoj de la mondo, okupante rangon 151.⁵⁴ Kaj rilate la nombron de murdoj Ruslando okupas, laŭ Javlinskj, la trian rangon.⁵⁵ Kion Putin kaj lia registaro faris por plibonigi tiun situacion, multaj homoj demandas sin. Kiel li intencas solvi ĉiujn tiujn problemojn li ne klarigis. La korupcion Putin aludis en sia parolado dufoje, same malofte li menciis ankaŭ la vorton „demokratio“, kiun la prezidento de Rusio evidente ne tro ŝatas. La vorto „opozicio“ komplete mankis. Kvankam li multe palavis pri dinamika evoluo, la koncepto de la merkatekonomio, kiu estus la ĉefa kondiĉo por tia evoluo, estis apenaŭ traktita. Pri Eŭropo estis malmulte dirite. Cetere, Ruslando ĉesis pagi membro-kotizon por la Eŭropa Konsilio.

Krom promesitaj sociaj kaj klerigaj programoj, kiuj probable restas nuraj promesoj kaj ĥimeroj, Putin prezentis novajn potencajn armilajn sistemojn, kiuj celas defendi Ruslandon kontraŭ fremdaj raketaj atakoj, kiuj fariĝos sensencaj. Dum Putin parolis pri intencoj de la defendo de Ruslando, lian ŝokan filman prezentaĵon Vaŝingtono interpretis kiel simuladon de atako kontraŭ Usono. Ĉu denove temas pri ridinda blufado de la Kremlo por impresi kaj timigi la mondon kaj trankviligi kaj kontentigi la propran popolon, estas malfacile diri, ĉar tiuj raketaj sistemoj ŝajne ankoraŭ ne funkcias plene, kaj multaj ekspertoj eĉ dubas, ke ili estas funkcipovaj, ĉar la rusa teknologio estas fifame konata pro multaj difektoj kaj fuŝoj. Krom tio mankas la mono por financi ilin. Ĉiuj tiuj prezentitaj armiloj, kiuj memorigas la filmojn de la „stela milito“, eble flugas nur en la paranoja fantazio de Putin, kiu povus servi kiel Blofeld en nova filmo de James Bond, kvankam li asertis, ke Rusio jam havas ilin kaj ke ili plene funkcias. Jam antaŭaj anoncoj de novtipaj rusaj aviadiloj far Putin montriĝis groteska falsaĵo, nura fanfaronado, mizera potjomkina trompo. Fakte, la usonanoj planis similajn armilajn sistemojn dum la Malvarma milito, sed pritaksis ilian realigeblon malalte, ĉar tro multekoste. Putin ripetas la klasikajn erarojn de la komunistoj de sovetiaj tempoj, se li investas la monon en la rearmadon anstataŭ en la civilan infrastrukturon kaj

⁵⁰ Aludo al la eldiro de la germana ekskanceliero Gerhard Schröder, kiu nomis Putin en 2004 „centprocente puran demokration“.

⁵¹ Grava temo en 2018 estis la kresko de la prezo de la benzino (vd. <http://kremlin.ru/events/president/news/57692>).

⁵² Ekzistas kelkaj regionoj, kiuj aparte suferas pro altgrada malriĉeco kaj mizero: Kostroma, Kabardino-Balkario, Orjol, Volgograd, Ivanovo, Smolensk, Kirov, Voronej, Inguŝio, Jakutio. Sed ankaŭ en Kalmikio, Mordvio, Ĥakasio, Karelio, Saĥalin la ekonomia situacio estas ege malfacila pro aparte drasta manko de mono, same kiel en Pskov, en la apudvolgia regiono kaj en Krimeo. En multaj regionoj kaj urboj la financado de publikaj institucioj estis draste reduktita (laŭ Javlinskij en la pasintaj 5 jaroj fermiĝis 24'000 lernejoj, 10'000 bibliotekoj kaj 10'000 hospitaloj).

⁵³ Vd. https://diepresse.com/home/meinung/gastkommentar/5444473/Anna-SchorTschudnowskaja_Putin-verhoehnt-Europas-Werte-Oesterreich.

⁵⁴ Kompare: Kongo: rango 152, Libio: 154, Ukrainio: 156, Jemeno: 158, Afganio: 160. Kiel sekvo malpli da turistoj vizitis Rusion (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/World_Tourism_rankings#Europe).

⁵⁵ Ne estas konate, sur kiu statistiko li baziĝis. Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_intentional_homicide_rate#By_country Rusio okupis la 164an rangon en 2015. En tiu kunteksto interesas ankaŭ jena statistiko: https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_federal_subjects_of_Russia_by_murder_rate.

produktadon de civilaj varoj. Pri internacia sekureco kaj mallarmado, kiel kutime rusaj ŝtatestroj antaŭ li tamen faris, li silentis. Male li proklamis, ke ĉiuj armilaj mankoj, kiuj aperis post la disfalo de Sovetunio, estas forigitaj kaj ke la malnova potencialo estas restarigita. Aparta dorno en la okuloj de la Okcidento estas la supozataj nukleaj stacioj kaj raketaj sistemoj en la Kaliningrada provinco, kiuj ne nur povus malfaciligi la aliron de NATO al Pollando kaj la Baltaj Ŝtatoj, sed kiuj signifas minacon por la najbaraj landoj kaj danĝeron por Eŭropo kaj la tuta mondo.⁵⁶ Nature, la diablajn ideojn, planojn kaj projektojn de Putin kaj de liaj militaj inĝenieroj oni ne devas subtaksi, bagateliĝi aŭ nei. Ĉu ili konscias, ke iliaj novaj armiloj povas ankaŭ kaŭzi terurajn akcidentojn antaŭ ol esti aplikataj en la praktiko? Ankaŭ en tiu plej nova parolado, kiu estis eŭforie aplaŭdata de la entuziasmaj ĉeestantoj, inter ili multaj virinoj kaj kelkaj ekleziuloj, Putin prezentis sin unu plian fojon kiel kolombon kaj falkon samtempe, kiu majstre regas la arton de la impresado kaj timigo.

Kiel la komentisto de *Neue Zürcher Zeitung* rimarkigis, ambaŭ grandpotencoj povas detrui unu la alian ankaŭ sen nova rearmado, ĉar en la „ekvilibro de la hororo“ de la Malvarma milito praktike nenio ŝanĝiĝis, malgraŭ la detruo de iuj malnovaj armiloj. Se Ruslando koncentriĝas en sia bizara kontraŭ-okcidenta obsedo pri nuklea konkurado, tio estas ĝia propra problemo. Ĉiuj scias, ke nuklea atako de unu lando kontraŭ alia kaŭzos verŝajne senprokrastan nuklean reagon de la atakita lando. Krom por kontentigi la propran megalomanion tiuj armiloj do estas sensencaj kaj nenecesaj, kaj ilia anoncado nur akcelas la spiralon de la internacia rearmado, ĉar certe la usonanoj produktos novajn superajn armilojn. Krom tio, aliaj landoj sentos sin minacataj kaj volas posedi proprajn nukleajn armilojn. Kun sia tuta impona armila arsenalo Putin do certe trafos pli frue aŭ malfrue la sakstraton, same kiel la Cara Imperio kaj Sovetunio siatempe. La historio ripetiĝos. Sed ĉu la rusoj vere estas tiel danĝeraj? Neniu povas klare respondi tiun demandon. En principo ĉiuj ŝtatoj, kiuj disponas pri nukleaj armiloj, devas esti konsiderataj kiel altgrade danĝeraj. La danĝereco de Ruslanda konsistas en tio, ĉar ĝia prezidento evidente povas fari kion ajn li volas sen demokratia, parlamenta aŭ registara kontrolo, sen demandi la popolon, kiu povus diri jes aŭ ne. Sed ekzistas observantoj kiel la irkutska historiisto Miĥail Rybalko, kiuj opinias, ke Putin ne estas danĝera por la monda paco, ĉar li estas racia homo, kiu evitas pli grandan militon kaj nur defendas la interesojn de Ruslando.⁵⁷ Kio ajn do okazas en Ruslando, por la cetera mondo estas grave eviti, ke la rusoj povu influi kaj subfosi la unuopajn landojn por pli malstabiligi la politikon, kiu jam estas sufiĉe fragila. Certe, Usono estas en la ĉefa fokuso de Putin, kaj la „ostaĝo“ Trump povus helpi al li ĉantaĝi ĝin kaj atingi certajn celojn de la Kremlo pri Usono, nome montri, ke la politika kaj morala venko de Usono kaj de la Okcidento super Ruslando en la Malvarma Milito ne estis definitiva, kaj nature vastigi la influon de Ruslando en la mondo, kiel jam dum sovetiaj tempoj. Ŝajnas, ke Putin, kiu evidente havas iun kuriozan historian mision por plenumi, ĝuas sian rolon kiel politika aventuristo, kiu povas senĉese permesi al si ĉiuspecajn frenezajn kapriolojn por ŝoki kaj timigi la mondon, kiuj evidente fariĝis la eliksiro de lia politika ekzistado kaj estas la viviga ŝtofo por la konfrontiĝo kun la Okcidento.

Favorataj „kronprincoj“

Laŭ la rusa konstitucio, la prezidenteco de Putin finiĝos en la jaro 2024. Kiu do estu lia posteulo, tiun ĉi demandon, pri kiu diskutas la tuta mondo, la rusa televido kaj grandparto de la ruslandaj amaskomunikiloj severe tabuis. Probable li solvos ĝin mem, aŭ laŭ metodoj kaj scenaroj, kiuj estas konataj el la pasinteco, aŭ per eĉ pli ruza taktiko. Ĝis nun rimarkeblis nenioj indikoj, ke li baldaŭ „reguligos“ sian postsekvon. Laŭ la analizo de Minĉenko Consulting de januaro-februaro 2013, kiu nomis la rondon de ĉefaj potenculoj de Ruslando „Politburoo 2.0“, al ĝi apartenis Dmitrij Medvedev, Sergej Ivanov, Igor Seĉin, Gennadij Timĉenko, Jurij Kovalĉuk, Sergej Ĉemesov, Sergej Sobjanin, Vjaĉeslav Volodin, Sergej Ŝojgu. En novembro 2016 Minĉenko Consulting publikigis aktualigitan liston de la „Politburoo 2.0“ kun jenaj nomoj laŭ jena vico: Sergej Ĉemesov, Jurij Kovalĉuk, Sergej Ŝojgu, Dmitrij Medvedev, Vjaĉeslav Volodin, Igor Seĉin, Arkadij Rotenberg, Sergej Sobjanin. Kiel „kandidatoj“ de tiu „politburoo“ estis nomitaj Viktor Solotov, Anton Vaino kaj Sergej Kirienko. Kiel eblajn „kronprincojn“ por heredi la tronon de Putin la rusaj amaskomunikiloj menciis lastatempe homojn kiel Dmitrij Medvedev (nuna ĉefministro), Sergej Sobjanin (nuna urbestro de Moskvo) kaj Aleksej

⁵⁶ Vd. <http://www.spiegel.de/politik/ausland/kaliningrad-russland-baut-offenbar-lagersystem-fuer-atomwaffen-aus-a-1213714.html> kaj <https://diepresse.com/home/ausland/aussenpolitik/5448960/Satellitenbilder-sollen-Ausbau-von-Atombunker-in-Kaliningrad-zeigen>.

⁵⁷ Vd. <https://www.youtube.com/watch?v=VApeQFaQpAI>, <http://www.islu.ru/personnel/rybalko-mikhail-leonidovich>.

Djumin (nuna vicministro pri defendo kaj guberniestro de Tula), kiu tute ne estas konata figuro,⁵⁸ surbaze de eksperta pritakso de la fondaĵo „Peterburga politiko“ de aŭgusto 2017. Inter dek plej favorataj nomoj troviĝas tiuj de Sergej Ŝojgu, Valentina Matvienko, Aleksej Kudrin, Anton Vaino, Sergej Kirienko, Vjaĉeslav Volodin kaj Igor Seĉin. De iuj observantoj Volodin, prezidanto de la Dumao, estas deklarita kiel tria plej grava homo de Ruslando post Putin kaj Medvedev. Plue menciitaj estis Sergej Naryŝkin, Elvira Nabiullina, Tatjana Golikova kaj Ramzan Kadyrov. Ĉi-lastan ĉeĉenon, kiu kreis kvazaŭ-privatan ŝtaton ene de Ruslando, Eidman konsideras ĉefa komplico de Putin en Norda Kaŭkazo kaj unu el la plej danĝeraj homoj de Ruslando, se temas pri la likvido de personaj malamikoj kaj kritikistoj de Putin kiel Politikovskaja kaj Nemcov. Eĉ se en tiu listo ankaŭ Aleksej Navalnyj, la ĉefa vera opoziciulo de Ruslando, estis nomita, li tamen ricevis relative malmultajn punktojn. Alia grupo de gravaj pintaj potenculoj konsistas el Nikolaj Patruŝev, iama ĉefo de FSB kaj nuna sekretario de la Sekureca Konsilio, Aleksandr Bortnikov, aktuala direktoro de FSB (iama KGB), Miĥail Fradkov, direktoro de la interna sekretservo (SVR), Dmitrij Rogozin, vicprezidanto de la rusia registaro kun gravaj funkcioj en la interna, ekstera kaj sekureca politiko, Evgenij Murov, direktoro de FSO, kaj Jurij Ĉajka, ĉefprokuroro de Rusio. La ŝanco, ke unu el tiuj spertaj „silovikoj“ povus esti puŝitaj de Putin kiel lia posteulo, estas alta – oni pensu nur pri Andropov. Ankaŭ pri homoj kiel Sergej Lavrov, ministro pri eksterlandaj aferoj, Vitalij Mutko, iama sportministro, Vladimir Medinskij, kulturministro, aŭ Aleksej Miller, ĉefo de Gazprom, oni ne forgesu pensi, same pri unu el la multnombraj guberniestroj, kiuj estas ligitaj en fera lojaleco kun Putin. Ankaŭ la ripeto de la ekzerco kun Medvedev de 2008-12 estas imagebla. Do, la menuo por elekti inter eblaj kandidatoj kaj scenaroj estas larĝa kaj vasta. Ĉu unu el tiuj „ŝakfiguroj“ vere taŭgus ankaŭ kiel populara ŝtatestro kun karismo kaj signifo ankaŭ en la internacia politiko, kiel Jelcyn kaj Putin (kiu iam ankaŭ estis nekonata griza figuro), tamen estas pli ol dubinde. Interese, ke la ĉefaj figuroj de la „sistema opozicio“ kiel Ĵirinovskij, Zjuganov kaj Mironov ne troviĝas sur tiuj listoj. Por la Okcidento verŝajne neniu el tiuj homoj estus tiel agrabla kiel Miĥail Gorbaĉov. De multaj observantoj Medvedev estis vidata kiel dua Gorbaĉov, kiu povus haltigi la Putinan aŭtokратиismon kaj daŭrigi la liberalajn reformojn, sed kiel ĉefministro de Putin li perdis siajn iamajn memstarecon kaj signifon. Plej kredeble nova prezidento fariĝos tiu homo, kiu estos ´elektita´ de Putin persone kaj ĝuas lian fidon, ĉar ĉi-rilate Rusio funkcias kvazaŭ kiel hereda monarkio. Sed ankaŭ en tiu ĉi rilato oni povas erari. Kiu ajn do fariĝos la posteulo de Putin, la heredaĵo, per kiu li (aŭ ŝi) ŝarĝos siajn ŝultrojn, estos ege peza.

La tuta spekulativado pri posteuloj estus vana, se Putin restos dumvive laŭ la modeloj de la ajatolo en Irano, Xi Jinping en Ĉinio aŭ Nazarbaev en Kazahio. Tian scenaron bone imagi povas Sergej Medvedev, liberaldemokratia politologo de la Moskva „Altlernejo por Ekonomio“, kiu avertis, ke Putin povus resti dumviva prezidento ankaŭ en la venontaj jardekoj, nome ĝis la jaro 2042, se lia sano restos bona. Simple necesus ŝanĝi la konstitucion, kion Putin certe povus facile aranĝi, eĉ kun la aprobo de la popolo. Por la cetera mondo, kiu al kutimiĝis al Putin, tia opcio eble ne estus la plej malbona.

Por disidentoj kiel Garri Kasparov (la iama sovetia ŝakludisto) tia scenaro ne estas tre ĝojiga. Laŭ li, la Putin-reĝimo signifas grandan minacon kaj danĝeron por la mondo. Tiun opinion konfirmas ankaŭ la plej signifaj kaj honorindaj neregistaraj organizaĵoj de la mondo, kaj praktike ĉiuj okcidentaj politikistoj kaj ĵurnalistoj. En la sama senco Igor Eidman, kiu postulis internacian komisionon por esplori la krimojn de Putin kaj preferis forlasi Ruslandon pro timo de atenco, kredas, ke la mondo estus pli sekura sen Putin. La post-gorbaĉova kaj precipe post-jelcyna Ruslando kontribuis nenion pozitivan al la homaro. Male, la prezidentecoj de Trump en Usono kaj Xi en Ĉinio kuraĝigos Putinon verŝi aldonan oleon en la fajron. Se Ruslando ne transformiĝos al normala demokratia respubliko, Miĥail Ĥodorkovskij timas, ke post Putin aperos nova Putin, eble eĉ pli terura. Kiel ajn, Ĵanna Nemcova, filino de la murdita politikisto, kaj multaj aliaj ne vidas pozitivan estontecon por Ruslando, se Putin restos ĝia gvidanto. Ankaŭ la monda gazetaro restas pesimisma. Pro tio Ruslando ĉiukaze bezonus politikan ŝanĝon, kiu estis denove maltrafita la 18an de marto 2018.

Andreas Künzli, www.planlingvoj.ch, marto/junio 2018

⁵⁸ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Алексей_Геннадьевич_Дюмин.

Noto: Ĉi tiu artikolo estis verkita en la monatoj antaŭ la 18a de marto kaj reviziita kaj kompletigita per aktualaj datenoj kaj sciigoj post la reelekto de Putin.

Bibliografio:

Biografioj de la kandidatoj (anglalingvaj):

Vladimir Putin: https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Putin

Pavel Grudinin: https://en.wikipedia.org/wiki/Pavel_Grudinin

Vladimir Ĵirinovskij: https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Zhirinovskiy

Ksenija Sobĉak: https://en.wikipedia.org/wiki/Ksenia_Sobchak

Grigorij Javlinskij: https://en.wikipedia.org/wiki/Grigory_Yavlinsky

Boris Titov: https://en.wikipedia.org/wiki/Boris_Titov

Maksim Suraikin: https://en.wikipedia.org/wiki/Maxim_Suraykin

Sergej Baburin: https://en.wikipedia.org/wiki/Sergey_Baburin

Konsultitaj fontoj:

<https://www.nzz.ch/international/russlands-oberstes-gericht-bestaetigt-nawalnys-ausschluss-von-der-praesidentenwahl-ld.1345020>

<https://www.nzz.ch/international/putin-wuenscht-eine-wahl-ohne-auswahl-ld.1342720>

<https://www.nzz.ch/international/wladimir-putin-waehlen-damit-sich-nichts-aendert-ld.1336421>

<https://www.nzz.ch/international/putin-ist-ein-teflon-praesident-ld.1343369>

<https://www.nzz.ch/wirtschaft/russlands-staatsfinanzen-aussen-stabil-und-innen-schief-ld.1342220>

<http://kremlin.ru/events/president/news/56639>

<https://www.n-tv.de/politik/Meinungsforscher-zum-Erfolg-des-Kremlchefs-article15069471.html>

<https://de.sott.net/article/23919-Umfrage-Putin-weltweit-beliebter-als-Dalai-Lama-und-Papst-Groten-Sprung-in-der-Beliebtheit>

<http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/internationale-umfrage-misstrauen-gegenueber-putin-in-vielen-laendern-gross-13735986.html>

<http://derstandard.at/1330390248643/Russland-Wahl-Das-dritte-Gesicht-des-Wladimir-Putin>

https://de.wikipedia.org/wiki/Präsidentenschaftswahl_in_Russland_2018

Вера Гуревич. Интервью 17 декабря 2012 г.

<https://www.youtube.com/watch?v=HM5wg95897o>

<http://www.bpb.de/internationales/europa/russland/47950/opposition?p=all>

https://www.rbc.ru/politics/21/08/2017/5999947f9a79470b77c71d3f?from=center_12

Putin, Vladimir: Rossija na rubeže tysjaĉiletie. 30.12.1999

www.ng.ru/politics/1999-12-20/4_millennium.html

<http://e.rutlib4.com/book/26257/p/2>

Inaŭgura parolado de V.V. Putin de la 7a de majo 2012 en la Kremlo, Moskvo

http://www.intelros.ru/strategy/gos_rf/17313-inauguracionnaya-rech-vladimira-putina-7-maya-2012-g-moskva-kreml.html

Minchenko Consulting: „Politburo 2.0“: Nakakune perezagruzki elitnych grup. 2013.

http://minchenko.ru/netcat_files/File/Politburo_full.pdf

<https://ruslanostashko.livejournal.com/122180.html>

https://fr.wikipedia.org/wiki/Le_Syst%C3%A8me_Poutine

<https://svpressa.ru/politic/article/189700/?ec=1>

<https://svpressa.ru/politic/article/188532/?ec=1>

http://www.ng.ru/politics/2018-01-30/100_kremlinlist.html

<http://www.sueddeutsche.de/politik/us-sanktionen-kreml-bericht-der-usa-treibt-russische-oligarchen-um-1.3842259>

<http://www.zeit.de/sport/2018-01/russland-doping-olympia-anordnung-wladimir-putin-betrug>

<https://www.nzz.ch/wirtschaft/sachalin-wo-oel-getrunken-und-gas-geatmet-wird-ld.1340142>

<https://www.tagesanzeiger.ch/ausland/asien-und-ozeanien/Russland-hat-keine-andere-Wahl/story/31600635>

<https://www.srf.ch/sendungen/eco/pharma-exportwunder-zahlungsverkehr-russlands-rohstoffabbau>

<http://www.novatek.ru/en/business/yamal-lng> (tie ĉi oni povas legi, ke la ŝtato subtenas la projekton per impostaj avantaĝoj). <http://kremlin.ru/events/president/news/56337/videos> (vizito de Putin)

https://de.wikipedia.org/wiki/Pr%C3%A4sidentschaftswahl_in_Russland_2018

(vd. ankaŭ la rusan version)

<http://www.bpb.de/internationales/europa/russland/47932/politisches-system>

Konferenco de la gazeto *Komsomolskaja pravda* okazinta la 11an de januaro 2018 en Moskvo (demando pri Navalnyj).

<https://www.youtube.com/watch?v=46KM6xAqt0>

Navalnyj volas plendi ĉe la Eŭropa Kortumo por Homaj Rajtoj.

<https://diepresse.com/home/ausland/aussenpolitik/5349128/Kremlkritiker-Nawalny-will-sich-an-Europaeischen-Gerichtshof-fuer>

Supera Tribunalo de Ruslando rifuzis la plendon de Navalnyj

<http://www.zeit.de/politik/ausland/2017-12/alexej-nawalny-kandidatur-verbot-praesidentenwahl-russland>

Путин назвал самые бедные регионы России

<http://www.mk.ru/economics/2017/10/31/putin-nazval-samye-bednye-regiony-rossii.html>

<https://iz.ru/686555/2017-12-22/nazvany-samye-bogatye-i-bednye-stolitsy-regionov-rossii>

<http://vivareit.ru/samye-bednye-regiony-rossii>

Самые богатые регионы России

<http://vivareit.ru/samye-bogatye-regiony-rossii>

Plej sekuraj kaj plej danĝeraj landoj de la mondo

<https://www.stern.de/politik/ausland/diese-karte-zeigt-die-sichersten-und-die-gefaehrlichsten-laender-der-welt-6890732.html>

Vladimir Kara-Murza honorita en Ĝenevo

<https://www.srf.ch/sendungen/tagesschau/handelsabkommen-mercosur-sans-papiers-genf-onlinehandel-boomt>

Navalnyj denove arestita la 22n de februaro 2018

<http://www.zeit.de/politik/ausland/2018-02/russland-alexei-nawalny-festgenommen-moskau>

„Junarmija“ – la patriotisma „Juna Armeo“ de Ruslando:

<http://www.spiegel.de/politik/ausland/russland-wladimir-putin-junge-patrioten-der-junarmija-a-1195248.html>

La kazo Konstantin Goldenzweig

<https://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/willkommen-in-putins-propagandamaschinerie/story/25040727>

Intervjuo kun Anton Ŝeĥovcov

<https://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/putin-ist-jedes-mittel-recht/story/30150204>

Jarraporto de Amnestio Internacia 2017/18

https://www.amnesty.ch/de/ueber-amnesty/publikationen/amnesty-report/jahre/air201718_english_2018.pdf

Отсталая, Тёмная и нищая Страна. Что происходило в 1917 году? Тихон Шевкунов 3 09 2017

<https://www.youtube.com/watch?v=TvD6D1QeUg0>

Список журналистов, убитых в России

https://ru.wikipedia.org/wiki/Список_журналистов,_убитых_в_России

Centra Elekta Komisiono de la Ruslanda Federacio

<http://www.cikrf.ru>

пKonfronto de Aleksej Navalnyj kun CIKRF kaj Ella Pamfilova (25a de dec. 2017)

https://www.youtube.com/watch?v=So3OnGqhs_g

Сведения реестра НКО, выполняющих функции иностранного агента

<http://unro.minjust.ru/NKOForeignAgent.aspx>

(Ĉi tiu listo estis komencita en junio 2013, ricevis pli da registraĵoj en 2014 kaj estis precipe plenigita, post kiam la usonanoj en 2015 fermis la usonan reprezentadon de la „Instituto por demokratio kaj kunlaboro“ en Novjorko. Fakte, kiel reago al la protestoj sur la Bolotnaja-placo en Moskvo en 2012 la Kremlo malpermesis la usonan organizaĵojn USAID kaj starigis per leĝo de la 12a de julio registron, en kiun homrajtaj kaj neregistaraj asocioj devos registriĝi kiel „eksterlandaj agentoj“, se li ricevis financon subtenon el eksterlando.)

Usona akuzo kontraŭ subfosantoj de la elekta procezo en Usono (2014-17)

<https://www.justice.gov/file/1035477/download>

<https://www.nzz.ch/international/us-justiz-klagt-13-russen-wegen-wahl-interventionen-an-ld.1358141>

Pritakso de la svisa balot-observanto Andreas Gross pri la situacio de elektoj kaj balotoj en Ruslando

<https://www.srf.ch/sendungen/echo-der-zeit/post-chefin-susanne-ruoff-kann-bleiben>

<https://www.aargauerzeitung.ch/ausland/politologe-zu-den-russland-wahlen-die-waehler-werden-mit-suessigkeiten-gekoedert-132324974>

Jarraporto 2018 de la Eksterlanda Sekreta Servo de Estonio

<https://www.valisluureamet.ee/pdf/raport-2018-ENG-web.pdf>

Ruslando permesas narkotikaĵojn dum la futbalaj ĉampionaj ludoj en 2018

<https://www.aargauerzeitung.ch/sport/russland-erlaubt-kokain-heroin-und-cannabis-bei-der-wm-2018-132268307>

Ruslando ĉesis pagi membrokoton por la Eŭropa Konsilio

<http://www.dw.com/de/russland-kein-geld-f%C3%BCr-den-europarat/a-42787711>

Debatoj de la prezidentecaj kandidatoj en la rusia televido

https://www.youtube.com/watch?v=qIheQ9_tgEo

<https://www.youtube.com/watch?v=EaNLjYbjYFI>

<https://www.youtube.com/watch?v=DCCNV1UOJhA>

<https://www.youtube.com/watch?v=mG5Ky2yVo34>

<https://www.youtube.com/watch?v=ktVIFSS98io>

Ĵirinovskij ofendas Sobĉak, kiu ĵetas la akvon de sia glaso kontraŭ li

<https://www.youtube.com/watch?v=q-ueoCdCYQ>,

<https://www.youtube.com/watch?v=4iIdZ5o51Ys>,

<https://www.youtube.com/watch?v=mG5Ky2yVo34> (daŭrigo de la diskuto)

<https://www.youtube.com/watch?v=qNb6e1zuRII> (alia epizodo)

Parolado al la nacio de V. Putin de la 1a de marto 2018

<http://kremlin.ru/events/president/news/56957>

(La originala teksto de la citaĵo estas: Чтобы идти вперёд, динамично развиваться, мы должны расширить пространство свободы, причём во всех сферах, укреплять институты демократии, местного

самоуправления, структуры гражданского общества, судов, быть страной, открытой миру, новым идеям и инициативам. (...) Не сделаем этого – не будет будущего ни у нас, ни у наших детей, ни у нашей страны.)

<https://www.nzz.ch/international/putin-stellt-russlands-staerke-zur-schau-ld.1362046>

<https://www.nzz.ch/meinung/putin-hofft-auf-einen-neuen-sputnik-schock-ld.1362478>

<https://www.nzz.ch/international/russland-will-wieder-militaerisch-punkten-ld.1362502>

<http://www.zeit.de/politik/ausland/2018-03/usa-russland-atomwaffen-wladimir-putin-aufruestung>

<http://www.msn.com/en-us/news/world/putin-just-bragged-about-russia%e2%80%99s-nuclear-weapons-here%e2%80%99s-the-real-story/ar-BBJSCDI?li=BBnbcA1&ocid=UE07DHP>

Intervjuo de NBC kun Putin (1a de marto 2018)

<https://www.nbcnews.com/news/world/putin-denies-new-cold-war-says-new-nukes-are-combat-n852496>

Venena atenco kontraŭ Sergej Skripal kaj lia filino

<http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/vergifteter-spion-russland-bietet-grossbritannien-hilfe-an-15479857.html>

<http://www.bbc.com/russian/news-43315006>

https://de.wikipedia.org/wiki/Sergei_Wiktorowitsch_Skripal

Rusio-analizo n-ro 350 pri la prezidenta elekto en Ruslando

<http://laender->

[analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen350.pdf?utm_source=newsletter&utm_medium=email&utm_campaign=Russland-Analysen+350&newsletter=Russland-Analysen+350](http://laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen350.pdf?utm_source=newsletter&utm_medium=email&utm_campaign=Russland-Analysen+350&newsletter=Russland-Analysen+350)

La privata ŝtato de Ramzan Kadyrov

<https://www.swp-berlin.org/publikation/tschetscheniens-stellung-in-der-russischen-foederation>

<https://www.youtube.com/watch?v=fIXAini24K4>

Познер - Гость Ксения Собчак. Выпуск от 29.01.2018

https://www.youtube.com/watch?v=t_Xra_HN8a8

Nova rusa filmo pri Vladimir Putin

<https://www.youtube.com/watch?v=3RK2xmLVkDI>

<https://www.youtube.com/watch?v=TyEPCQHMLM8>

Pri la kapitalisma komunisto Pavel Grudinin

<https://www.derbund.ch/ausland/europa/erdbeerroter-kapitalist/story/13341223>

Intervjuoj kun Miĥail Ĥodorkovskij, la 13an de marto 2018

<https://www.zdf.de/nachrichten/heute/chodorkowski-zu-fall-skripal-putin-hat-das-befiehlt-oder-die-lage-nicht-im-griff-100.html>

http://www.deutschlandfunk.de/russland-wahl-chodorkowski-putin-duerfte-zur-wahl-gar-nicht.694.de.html?dram:article_id=412930

Intervjuo kun Grigorij Mel'kon'janc

Der Bund (Bern), 16a marto 2018

Putin kiel ajatalolo

<https://inosmi.ru/russia/20090903/252224.html> (2009)

<https://daynice.livejournal.com/690810.html> (2016)

Jens Stoltenberg: Ruslando fariĝas pli malfacile taksebla kaj pli agresema

<http://www.zeit.de/politik/ausland/2018-03/jens-stoltenberg-nato-russland>

Datenoj de la Levada-Centro

<http://www.sueddeutsche.de/politik/putin-praesident-russland-macht-in-zahlen-1.3898926>

Organizaĵo „Golos“

[https://en.wikipedia.org/wiki/Golos_\(election_monitor\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Golos_(election_monitor))

Ekonomia situacio en 2017

<http://www.spiegel.de/wirtschaft/unternehmen/russland-wladimir-putins-wirtschaftsbilanz-nach-18-jahren-a-1198313.html>

Recesio en Ruslando

<http://www.faz.net/aktuell/wirtschaft/konjunktur/russlands-wirtschaft-erstattet-rezession-fast-sicher-13524087.html>

Pri la tago de la voĉdono

<https://www.derbund.ch/ausland/europa/So-bringt-Putin-die-Russen-zu-seiner-Wiederwahl-an-die-Urnen/story/23542480>

<https://www.derbund.ch/ausland/europa/Putin-hat-sich-schon-gewaeht/story/24304874>

Sekvojn de la Putin-propagando

<https://www.tagesschau.de/ausland/intellektuelle-russland-101.html>

Putin-aprobo ĉe la rusa junularo estas plej alta

<https://de.sputniknews.com/kommentare/20180321320003236-putins-generation-gefah-westen>

Oficialaj rezultoj de la prezidenta elekto de la 18a de marto 2018

http://www.vybory.izbirkom.ru/region/region/izbirkom?action=show&root=1&tvd=100100084849066&vrn=100100084849066®ion=0&global=1&sub_region=0&prver=0&pronetvd=null&vbid=100100084849066&type=227

Post la elekto:

Kiel la elekto estis manipolata:

<https://www.watson.ch/International/Russland/471741546-Diese-7-Beispiele-zeigen--wie-die-russischen-Wahlen-manipuliert-wurden> (germanlingve)

Pri la estonteco de Ruslando:

<http://www.sueddeutsche.de/politik/praesidentschaftswahl-in-russland-jetzt-stellt-sich-die-zukunftsfrage-1.3911972> (germanlingve)

Pri la neceso de reformoj:

<https://www.cicero.de/russische-praesidentschaftswahlen-wirtschaft-reformen-verstaatlichung-privatisierung> (germanlingve)

Raporto de BUND (Berno)

<https://www.derbund.ch/ausland/europa/rueckenwind-fuer-putin/story/25454684>

Monda gazetaro estas pesimisma:

<https://www.welt.de/politik/ausland/article174688550/Wahl-in-Russland-Presse-befuerchtet-gruselige-Konsequenzen.html>

Pri la elekto en Dagestano

<https://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/eine-fast-sowjetische-normalitaet/story/23405019>

OSKE kritikis Rusion pro „premo al la elektantoj“, „manko de konkurenco kaj vera elekteblo“ kaj „maljusta premo kontraŭ kritikantoj“.

<https://themoscowtimes.com/news/osce-blames-russia-for-pressuring-voters-in-elections-lacking-competition-60863>

<https://www.rferl.org/a/russia-putin-landslide-victory-violations-vote-pressure/29108915.html>

<https://www.nzz.ch/international/osze-beobachter-kritisieren-die-russische-praesidentenwahl-ld.1367391>

Ella Pamfilova konfesis mankojn

<http://www.russland.news/pamfilowa-raeumte-maengel-bei-der-praesidentschaftswahl-ein>

https://de.wikipedia.org/wiki/Ella_Alexandrowna_Pamfilowa

Prioritatoj de la Putin-registaro:

<https://www.rbc.ru/politics/19/03/2018/5aaf9e649a794738475b0c67?from=main> (ruslingve)

Kial Ruslando estas minacata de stagnado

<https://www.nzz.ch/wirtschaft/warum-russland-weitere-stagnation-droht-ld.1365744>

Intervjuo kun la rusa politologo Ekaterina Ŝulman

<http://www.sueddeutsche.de/politik/interview-am-morgen-russen-sehen-in-putineinen-hoffnungstraeger-1.3907946> kaj <https://www.tagesanzeiger.ch/ausland/standard/es-wird-schwierig-einen-nachfolger-fuer-putin-zu-finden/story/20323905> (germanlingve)

https://ru.wikipedia.org/wiki/Шульман,_Екатерина_Михайловна

Intervjuo kun Irina Ŝĉerbakova, kunfondinto de „Memorial“

<https://www.srf.ch/sendungen/echo-der-zeit/wie-steht-es-um-die-opposition-in-russland> (germanlingve)

https://de.wikipedia.org/wiki/Irina_Scherbakowa

Intervjuo kun Matthias Platzeck, 19a de marto

<https://www.youtube.com/watch?v=0x3dRcfZ0aw> (germanlingve)

Wolfgang Kubicki volas nuligi la sankciojn

<http://www.spiegel.de/politik/deutschland/russland-sanktionen-fdp-politiker-distanzieren-sich-von-wolfgang-kubicki-a-1199126.html>

Komentario (NZZ)

<https://www.nzz.ch/meinung/putin-triumphiert-und-kann-sich-trotzdem-nicht-sicher-fuehlen-ld.1367280>

(germanlingve)

Navalnyj rifuzas la proponon de Sobĉak kunlabori

<https://www.youtube.com/watch?v=gOeAy2ytMnU>

<https://www.nzz.ch/international/russlands-liberale-opposition-ist-an-einem-tiefpunkt-das-ist-nicht-nur-putins-schuld-ld.1367974?reduced=true>

Akcepto de la prezidentaj kandidatoj fare de Putin (19a de marto)

<http://kremlin.ru/events/president/news/57092>

<http://en.kremlin.ru/events/president/news/57092>

Вечер с Владимиром Соловьёвым (19.3.2018)

<http://rupolitshow.ru/vecher-s-vladimirom-solovevym-19-03-2018.html>

Esenca fakliteraturo pri la temo (en germana, angla kaj rusa lingvoj):

- Seipel, Hubert: Putin: logika vlasti. Vremja 2018.

(<https://mybook.ru/author/hubert-zajpel/putin-logika-vlasti>, <https://ru.sputnik-news.ee/news/20160607/2031747.html>, <https://www.youtube.com/watch?v=dpXiYDixT2Q>)

- Mommsen, Margareta: Das Putin-Syndikat. Russland im Griff der Geheimdienstler. C.H. Beck 2017.

(<http://www.ub.unibas.ch/tox/IDSLUZ/001297599/PDF>)

- Gabowitsch, Mischa: Protest in Putin's Russia. Malden, MA, Polity 2017.

(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/e19_978-0-7456-9625-6_01.pdf)

- Sapper, Manfred; Weichsel, Volker: Lev Gudkov. Wahres Denken. Analysen, Diagnosen, Interventionen. Edition Osteuropa 2. DGO, Berlin 2017.

(<https://www.zeitschrift-osteuropa.de/hefte/2017/edition-osteuropa-2>, <https://www.zeitschrift-osteuropa.de/site/assets/files/18278/oe171311.pdf>)

- Myers, Steven Lee: Putin. Der neue Zar. Seine Politik – sein Russland. Orel Füssli 2016.

(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-280-05602-8_01.pdf)

- Eidman, Igor: Das System Putin. Wohin steuert das russische Reich? Aus dem Russ. München 2016.

(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-453-28083-0_01.pdf)

(https://de.wikipedia.org/wiki/Igor_Wilenowitsch_Eidman)

- Reitschuster, Boris: Putins verdeckter Krieg. Wie Moskau den Westen dastabilisiert. Econ 2016.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-430-20207-7_01.pdf)
 - Zygar, Mikhail: All the Kremlin's men. inside the court of Vladimir Putin. Public Affairs (New York) 2016.
(<http://www.ub.unibas.ch/tox/IDSBB/006659477/PDF>)
 - Michail Zygar', Vsja kremlevskaja rat'. Kratkaja istorija sovremennoj Rossii. Intellektual'naja literatura (Moskva) 2016.
 - Pribylovskij, Vladimir (u.a.): Vokrug Putina. biografičeskij spravočnik. Panorama (Moskva) 2016.
 - Schanna Nemzowa: Russland wachrütteln. Vater Boris Nemzow und sein politisches Erbe. Aus dem Russ. Ullstein 2016.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-550-08129-3_01.pdf)
 - Schmid, Ulrich: Technologien der Seele. Vom Verfertigen der Wahrheit in der russischen Gegenwartskultur. Suhrkamp 2016.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-518-12702-5_01.pdf)
 - Wehner, Markus: Putins kalter Krieg. Wie Russland den Westen vor sich hertreibt. Knauer 2016.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-426-78814-1_01.pdf)
- Gelman, Wladimir: Das Jahr 2016 im Rückblick: Russische Innenpolitik. 16.12.2016.
(<http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen327.pdf>)
- Laqueur, Walter: Putinism. Russia and its future with the West. Thomas Dunne Books (New York) 2015.
 - Laqueur, Walter: Putinismus. Wohin treibt Russland ? Propyläen 2015.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-549-07461-9_01.pdf)
 - Seipel, Hubert: Putin. Innenansichten der Macht. Hoffmann und Campe, 2015.
(<http://www.ub.unibas.ch/tox/IDSBB/006412029/PDF>)
 - Gloger, Katja: Putins Welt. Das neue Russland, die Ukraine und der Westen. Berlin Verlag 2015.
(<https://d-nb.info/1070832693/04>)
 - Zygar, Michail: Endspiel. Die Metamorphosen des Wladimir Putin. Kiepenheuer & Witsch 2015.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-462-04830-8_01.pdf)
 - Eltchaninoff, Michel: In Putins Kopf. Die Philosophie eines lupenreinen Demokraten. Aus dem Franz. Actes Sud / Tropen 2015.
(<https://d-nb.info/1078450196/04>)
 - Zimmerman, William: Russland regieren. Von Lenin bis Putin. Aus dem Engl. Philipp von Zabern 2015.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/e19_978-3-8053-4931-4_01.pdf)
 - Michail Gorbatschow: Das neue Russland. Der Umbruch und das System Putin. Quadriga, Bastei Lübbe (Köln) 2015.
(<https://d-nb.info/1069860735/04>)
 - Myers, Steven Lee: Putin. The new tsar. The rise and reign of Vladimir Putin. Alfred A. Knopf (New York) 2015.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-0-307-96161-7_01.pdf)
(<http://inosmi.ru/politic/20161123/238264601.html>)
 - Belkowski, Stanislaw: Wladimir. Die ganze Wahrheit über Putin. Aus dem Russ. Redline 2014.
(<https://d-nb.info/1029203288/04>)
 - Reitschuster, Boris: Putins Demokratie. Ein Machtmensch und sein System. Econ 2014.
(<https://d-nb.info/1049799550/04>)
 - Dawisha, Karen: Putin's Kleptocracy. Who Owns Russia? Simon & Schuster, New York 2014.
(<http://www.ub.unibas.ch/tox/IDSBB/006319737/PDF>)

- Gabowitsch, Mischa: Putin kaputt!? Russlands neue Protestkultur. Suhrkamp 2013. (Detala analizo de la protestoj de la vintro 2011/2).
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_978-3-518-12661-5_01.pdf)
- Gessen, Masha: Der Mann ohne Gesicht. Wladimir Putin. Eine Enthüllung. Piper 2012.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-492-05529-1_01.pdf)
- Harding, Luke: Mafiastaat. Ein Reporter in Putins Russland. Aus dem Engl. London 2012.
(<https://d-nb.info/1018061576/04>)
- Ruge, Gerd: Russland. Portrait eines Nachbarn. C.H. Beck 2012.
(<http://www.ub.unibas.ch/tox/IDSBB/005849248/PDF>)
- Erler, Gernot; Schulze, Peter W. (Hg.): Die Europäisierung Russlands. Moskau zwischen Modernisierungspartnerschaft und Grossmachtrolle. Campus, 2012.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-593-39529-6_01.pdf)
- Gel'man, Vladimir: Regime, Opposition und die Herausforderungen des elektoralen Autoritativismus in Russland. 2012.
(<http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/Russlandanalysen242.pdf>)
- Albrecht, Erik: Putin und sein Präsident. Russland unter Medwedew. Orel Füssli 2011.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-280-05427-7_01.pdf)
- Rahr, Alexander: Der kalte Freund. Warum wir Russland brauchen: die Insider-Analyse. Hanser 2011.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-446-42438-8_01.pdf)
- Politkovskaja, Anna: Die Freiheit des Wortes. Letzte Berichte aus einem gefährdeten Land. DuMont, 2011.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-8321-9642-4_01.pdf)
- Gudkov, Lev; Zaslavsky Victor: Russland. Kein Weg aus dem postkommunistischen Übergang. Wagenbach 2011.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-8031-3635-0_01.pdf)
- Wipperfürth, Christian: Russlands Außenpolitik. VS Verlag für Sozialwissenschaften (Wiesbaden) 2011.
(<http://aleph.unisg.ch/hsgscan/hm00398649.pdf>)
- Fleischmann, Eberhard: Das Phänomen Putin. Der sprachliche Hintergrund. Leipziger Universitätsverlag 2010.
(<https://d-nb.info/1000184404/04>)
- Fel'shtinskij, Jurij; Pribylovskij, Vladimir: The Corporation: Russia and the KGB in the Age of President Putin. Encounter Books 2009.
Rusa versio: Korporacija. Rossija i KGB vo vremena Putina.
(<https://www.e-reading.club/book.php?book=147123>, <http://www.urantia-s.com/library/felshinsky/corporation/full>)
- Sager, Dirk: Pulverfass Russland. Wohin steuert die Grossmacht? Rowohl 2009.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-499-62330-1_01.pdf)
- Heyden, Ulrich; Weinmann, Ute: Opposition gegen das System Putin. Rotpunktverlag 2009.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-85869-389-1_01.pdf)
- Zenkovich, Nikolaj: Putinskaja enciklopedija. Moskau 2008.
- Politkovskaja, Anna: In Putins Russland. Fischer 2008.
(<https://d-nb.info/986701165/04>)
- Reitschuster, Boris: Der neue Herr im Kreml. Dimitrij Medwedew. Econ 2008.
(<https://d-nb.info/986909726/04>)
- Mommsen, Margarete; Nussberger, Angelika: Das System Putin. C.H.Beck 2007.
(http://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-406-54790-4_01.pdf)

- Politkovskaja, Anna: Russisches Tagebuch. DuMont 2007.
(<http://doc1.lbf.li/aar/FLMA150634.pdf>)
- Buhbe, Matthes; Gorzka, Gabriele (Hrsg.): Russland heute. Rezentralisierung des Staates unter Putin.: VS Verlag für Sozialwissenschaften (Wiesbaden) 2007.
- Roj Medvedev: Vladimir Putin. Molodaja gvardija, Moskau 2007.
(https://en.wikipedia.org/wiki/Roy_Medvedev)
- Anna Politkovskaja: In Putins Russland. DuMont 2006.
(<http://www.ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT014952911/PDF>)
- Čadaev, Aleksej: Putin: ego ideologija. Evropa, Moskau 2006.
(https://ru.wikipedia.org/wiki/Алексей_Викторович_Чадаев)
- Erler, Gernot: Russland kommt. Putins Staat – der Kampf um Macht und Modernisierung. Herder 2005.
(<http://aleph.unisg.ch/hsgscan/hm00127692.pdf>)
- Reitschuster, Boris: Wladimir Putin. Rowohlt 2004.
(<http://www.ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT014385789/PDF>)
- Gorzka, Gabriele; Schulze, Peter W. (Hg.): Wohin steuert Russland unter Putin? Der autoritäre Weg in die Demokratie. Campus, 2004.
(<http://aleph.unisg.ch/phsscan/hr70007476.pdf>)
- Kryschtanowskaja, Olga: Anatomie der russischen Elite. Die Militarisierung Russlands unter Putin. Aus dem Russ. Kiepenheuer & Witsch, 2004.
(<http://aleph.unisg.ch/hsgscan/hm00127277.pdf>)
- Fel'shtinskij, Jurij; Pribylovskij, Vladimir: Operacija „Naslednik“. 2004.
(<http://www.lib.ru/HISTORY/FELSHTINSKY/naslednik.txt>)
- Mommsen, Margarete: Wer herrscht in Russland? Der Kreml und die Schatten der Macht. C.H. Beck 2003.
(<http://aleph.unisg.ch/hsgscan/hm00059376.pdf>)
- Timtschenko, Viktor: Putin und das neue Russland. Hugendubel 2003.
(<http://www.ub.unibas.ch/tox/IDSLUZ/000652004/PDF>)
(<https://www.perlentaucher.de/buch/viktor-timtschenko/putin-und-das-neue-russland.html>)
(https://de.wikipedia.org/wiki/Viktor_Timtschenko)
- Rahr, Alexander: Vladimir Putin – Präsident Russlands – Partner Deutschlands. Universitas 2002.
- Blockij, Oleg: Vladimir Putin. Meždunarodnye Otnošenija, Moskau 2002.
(<http://readly.ru/author/8570>, <https://eksmo.ru/authors/blotskiy-oleg-ITD19799>)
- Kagarlitsky, Boris: Russia under Yeltsin and Putin. Neo-liberal autocracy. Pluto Press (London), 2002.
- Klebnikow, Paul: Der Pate des Kreml. Boris Beresowski und die Macht der Oligarchen. Aus dem Amerikan. Econ .2001.
(<http://aleph.unisg.ch/hsgscan/hm00078352.pdf>)
- Rahr, Alexander: Wladimir Putin. Der „Deutsche“ im Kreml. Universitas 2000.
- Seiffert, Wolfgang: Wladimir W. Putin. Wiedergeburt einer Weltmacht? F.A. Herbig Langen Müller 2000.
- Geworkjan, Natalja; Kolesnkiw, Andrej; Timakowa, Natalja: Aus erster Hand. Gespräche mit Wladimir Putin. Aus dem Russ. Wilhelm Heyne 2000.

Datenoj de OECD pri Ruslando

<http://www.oecd.org/russia>

Nomaro de konataj kaj signifaj homoj de Ruslando de la erao Putin

<http://www.osteuropa.ch/putin-lexikon.htm>

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, marto/junio 2018

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).